



esperanto

SEPTEMBRO 1960

5 3 a J A R O

REVUO INTERNACIA

N-RO 658 (9)

Fondinto : H. HODLER

Honora Redaktoro : HANS JAKOB

Ĉion por la redakcio oni sendu al la Redaktorino :
S-ino Kirsten Zacho, Randbølvej 4, København, Danlando.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto
(abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA
ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-2,
Nederlando. Telefono : (010) 128313. Ĝirkonto : 378964
TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive
la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ
la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj,
kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon
al nia redakcio.

Jara abono (1960): 9,50 gld. (kun membreco kaj jarlibro
12,50 gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 128,— gld, 1/2 paĝo 64,— gld, 1/4 paĝo 32,— gld,
1/8 paĝo 16,— gld, 1/16 paĝo 8,— gld.

Anoncetoj pri korespondado :

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu
duo da vortoj.

Legantoj en 80 landoj.

Estraro de U.E.A. :

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37,
Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere
Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road,
London E 11, Britujo.

Prof. D-ro Hideo Yagi, vic-prezidanto, 76 Kawaramachi,
Okayama, Japanujo.

E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47,
Arnhem, Nederlando.

Norman R. Smith, estrarano pri kulturaj aferoj, 75 South
Ealing Road, South Ealing, London W 5, Britujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri eŭropa lingvo-kampanjo,
Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

A. Rajski, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odyńca
3/5, Warszawa, Pollando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo,
Telefono : ARNold 90-81.

Serva Centro, Palais Wilson Genève. Svislando.

Honora Administranto : Hans Jakob. Telef. 323034.

LA FRONTPAĜA BILDO :

Jana Ravŝelj (F-ino Giannina) kaj Eta Bartolazzi
(F-ino Costanza) en la kongresa teatraĵo *Kurioza*
Okazaĵo de Goldoni.

Enhavo

Raportaro pri la 45-a U.K. Bruselo :

Humanisma Internaciismo kaj la

Internacia Lingvo 141

La Inaŭguro 144

La dumkongresa laboro de U.E.A. . . . 145

Ĉefaj kulturaj aranĝoj 149

Fakaj kaj neneŭtralaj organizaĵoj . . . 154

Aliaj aranĝoj kaj gravaĵoj 156

Rubrikoj :

La Internaciaj Konkursoj 164

Radio 164

Oficiala Informilo 164

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la
redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare
tajpitaj en perfekta Esperanto. Oni skribu sur nur
unu flanko de la papero (prefere en normformato
A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa marĝeno
maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto.
Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn super-
signojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn
manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko
aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

HUMANISMA INTERNACIISMO KAJ LA INTERNACIA LINGVO

NOVA RESPONDECO DE LA ESPERANTO-MOVADO

(Festparolado de Prof. D-ro Ivo Lapenna *)

Al la 45-a Universala Kongreso de Esperanto aliĝis 1930 personoj. Ĝin markis ampleksega programo de 116 eroj; intensa laboro en diversaj kunvenoj kaj kunsidoj; altnivelaj kulturaj manifestacioj, inter kiuj elsaltas la brila Teatra Vespero; firmeco per kiu la neŭtrala Esperanto-Movado, konscia pri la novaj respondecoj en la nunaj kondiĉoj, akceptis nombron da decidoj por vastigi la instruadon de la lingvo kaj ĝian aplikadon en la internaciaj rilatoj. La redakcio opinias, ke nenio pli bone kaj pli koncize povas prezenti la pozicion de la Esperanto-Movado en la hodiaŭa mondo kaj la rolon, kiun la Internacia Lingvo devas plenumi en la nova situacio, ol la Festparolado de Prof. Ivo Lapenna en la Inaŭgura Kunsido. Tial, anstataŭ la kutima enkonduka artikolo, ĝi publikigas preskaŭ komplete tiun paroladon, kiu samtempe plej taŭge reflektas la agordon, en kiu evoluis la laboroj de la Kongreso. La Ĝenerala Sekretario de U.E.A. diris:

La lando de nia ĉijara Kongreso ne estas granda laŭ la amplekso nek laŭ la nombro de loĝantoj, sed ĝi certe estas granda laŭ sia historio, laŭ la elstaraj kulturaj tradicioj kaj konsiderindaj artaj valoroj kreitaj sur tiu ĉi grundo, laŭ la laboremo, kuraĝo kaj dinamismo de ĝia popolo. Sed Belgujo elvokas admiron ankaŭ pro alia kaŭzo, kiu speciale interesas nin esperantistojn. Jam antaŭ la jaro 1830 kaj poste dum la tuta 19-a jarcento ĝis la plej nova epoko tiu ĉi regiono estis scenejo de grandaj interlingvaj luktoj, en kiuj superregis jen unu lingvo, jen la alia — kion, cetere, la malamiko klopodis ekspluati por pli facile subigi la popolon — ĝis fine oni trovis solvon justan en la egaleco de ambaŭ. Belgujo kaj ĝia ĉefurbo — tiu ĉi fama kaj belega Bruselo, en kiu la majesto de gotiko, la pompo de baroko kaj la sveltaj linioj de modernaj palacoj kunfandiĝas en harmonian tuton sintezigante tiel en la estanteco la gloron de la pasinteco kun la strebadoj al la estonteco — tiu ĉi Bruselo konas bone la gravecon de la lingva problemo ne nur kiel problemo pure teknika, sed ankaŭ kaj ĉefe kiel problemo kultura, socia kaj politika. Estante unu el la grandaj centroj de la monda trafiko kaj sidejo de multaj interŝtataj kaj privataj internaciaj organizaĵoj kaj organismoj, Bruselo perfekte scias kaj palpeble sentas ankaŭ la tutan kompleksecon de la lingvoproblemo en la internaciaj rilatoj. Bruselo scias, ke en la palaco mem de nia kongreso oni kutime aŭdas ne nur du, sed tri, kvar aŭ pli da oficialaj lingvoj kaj ke nia kongreso estas la unua — por la momento eĉ la sola — internacia vere monda kongreso, kiu en ĝi uzas unu solan, neŭtralan supernacian lingvon egalan por ni ĉiuj, kaj same karan al ĉiu el ni kiel nia propra gepatra lingvo. Tiun Bruselon, la ĉefurbon de la Belgoj kaj samtempe urbon mondan; Bruselon de harmoniaj kontrastoj simbolantaj la unuecon de ĝia multflankeco kaj akcentantaj la ĉarmon de la detaloj; Bruselon oficiale dulingvan kaj neoficiale multlingvan ni tutkore salutas, aprezas, plene komprenas kaj dankas al ĝi pro la taŭga etoso, kiun ĝi prezentas por

kongreso vere universala. Ni estas certaj, ke ankaŭ Bruselo komprenos nin kaj aprezos niajn klopodojn.

I

Antaŭ dek jaroj ni kongresis en urbego proksima, en la glora Parizo, kiun Bruselo multilate tiel sukcese fratinas. Tiu relative mallonga periodo estas saturita de eventoj, kiuj signifas decidan turniĝon en la historia evoluo de la homaro, sed pri kies mondoskua graveco la grandega plimulto de la homoj, al kutimiĝintaj al tradicia pensmaniero kaj alkroĉitaj al rutinaj ĉiutagaĵoj apenaŭ povas imagi, ankoraŭ malpli konscii pri ĝi. Tio rilatas ne nur al la ordinara homoj, sed ankaŭ al iliaj elektitaj aŭ kelkfoje neelektitaj reprezentantoj ĉie tra la mondo kaj eĉ, almenaŭ parte, al tiuj grandaj sciencaj mensoj, kies brilaj malkovroj ebligis la gigantajn materie-teknikajn venkojn de la Homo super la naturaj fortoj en la lastaj jaroj.

Tion, kion sole la plej vigla fantazio povis nur pale bildigi al si antaŭ nelonge, en la lasta jardeko fariĝis realaĵo. La homo malleviĝis al la obskuraj ankoraŭ ne esploritaj profundoj de la maro kaj malkovris tie novan vivon. Li ankaŭ leviĝis ĉiam pli kaj pli alten al la suproj de la atmosfero kaj hodiaŭ flugas super la vastoj de la maroj, krutaĵoj de la montegoj kaj frostiĝintaj akvoj de la arktiko de unu kontinento al la alia per konsternaj rapidecoj en nuraj kelkaj horoj. Submara ŝipo pelata de atoma energio navigacias sub dikaj glacitavoloj de oceano en oceanon, dum samtempe ĉiam pli kaj pli multnombraj artefaritaj satelitoj ĉirkaŭiras nian terglobeton kaj eĉ ekskursas al la luno, kaj ne pasos longa tempo — certe ne — antaŭ ol la homo mem entreprenos aŭdacajn spacveturadojn kaj eĉ metos sian piedon sur iun ĉielkorpon.

La progresoj de la tekniko en ĉiuj ĝiaj branĉoj

*) Laŭ la KONGRESA GAZETARA SERVO, kelkloke iom mallongigita. La parolado estis ofte interrompita per vigla aplaŭdo de la tuta Kongreso. Fortega aprobo sekvis la finajn vortojn.

sentigis fortan efikon sur la tutan ekonomian vivon. Ĉiam pli perfektaj maŝinoj produktas amase ĉiaspecajn varojn kontentigante la ekzistantajn postulojn kaj kreante novajn dezirojn kaj bezonojn. Sendube ankoraŭ ekzistas mizero, eĉ granda mizero, en la mondo; ankoraŭ ekzistas homoj, milionoj da ili, kiuj vivetas sen akvo, sen lumo, sen higieno kaj ofte eĉ sen peceto da pano aŭ manpleno da rizo, sed, ĝenerale parolante, la vivnivelo altiĝis kaj plue konstante altiĝas. En kelkaj mondopartoj ĝi estas tiel alta, ke apenaŭ la plej klarvidaj ekonomiistoj povis ĝin supozi antaŭ mallonga tempo. La aŭtomatigo, se ĝi estos akompanata de adekvataj sociaj reformoj, faros ke la maŝino anstataŭos la homlaboron, kio siavice liberigos senfinajn intelektajn kaj fizikajn energiojn, kaj faros la vivon pli agrabla kaj pli interesa. La nuntempaj produktaj fortoj, senĉese abunde nutrataj de novaj epokfaraj sciencaj malkovroj, estas tiaj, ke ili tutcerte plene sufiĉas por krei jam nun bonstaton absolute ĉie en la mondo, se la politika situacio ne devigus la ŝtatojn elspezi grandegan parton de la nacia enspezo, t.e. de la ekonomiaj valoroj kreitaj de la homo, por celoj nete neproduktivaj en tempo paca kaj definitive detruaj — t.e. tiel detruaj, ke la mondo estos por ĉiam dezertigita kaj eble eĉ diserigita — en okazo de milito. Estu kiel ajn, unu afero estas senduba: la hodiaŭaj produktaj teknikaj rimedoj kaj ilia konstanta perfektigado garantias, per si mem, ekonomian prosperon kaj floradon.

La teknika kaj ekonomia progreso sentiĝis ne nur en Eŭropo, en Ameriko kaj en aliaj mondopartoj industrie evoluintaj, sed ankaŭ en regionoj, kiuj estis kaj grandparte ankoraŭ estas subevoluintaj. Tio ebligis la kreiĝon de nombro da novaj ŝtatoj en Azio kaj lastatempe en Afriko. Fakte historie necesa kaj pli ol salutinda, kio, tamen, neniel signifas ke en kiu ajn senco estas aprobindaj la tro akcentitaj naciismoj, ŝovinismoj aŭ eĉ novaj rasismoj de la ĵus liberiĝintaj popoloj.

II

Al tiuj admirindaj progresoj de la materiaj fortoj jam delonge ne plu respondas la malnova politika penso kaj la arkaikiĝintaj formoj de la politika realaĵo en la mondo. Sed tio, kio estas kreita kaj plue kreata en la nuntempo sur la kampo de materia kulturo vere impete puŝas la homaron al novaj politikaj formoj, devigas ĝin urĝege adapti la politikajn instituciojn en la plej larĝa senco de la vorto al la novaj kondiĉoj. Teknike ni vivas en la dua duono de la dudeka jarcento, sed politike kaj spirite ni estas ankoraŭ en la deknaŭa jarcento kun ĉiuj akcesoraĵoj de la tiutempaj konceptadoj ekde la absoluta ŝtata suvereneco, tra interŝtataj rivallecoj, diplomatia marĉandado, ĝis luktoj sur la rando de milito, kiu, diference de tiuj el la deknaŭa jarcento kaj de la du lastaj, signifus la finon de

ĉiuj, sen venkintoj kaj sen venkitoj. *Kaj tiu kontraŭaĵo inter la progresintaj materiaj-ekonomiaj fortoj kaj la postrestintaj politikaj formoj de kunvivado prezentas la fundamentan antagonismon de nia epoko.* Ne estas hodiaŭ la vastaj maroj, nek la plej krutaj kaj altaj montoĉenoj, nek la senvivaj dezertoj, nek la glaciaj ebenaĵoj, sed estas, unuflanke la arte konstruitaj obstakloj de politikaj limoj kaj, aliflanke, la lingvaj baroj, tiuj muregoj, kiuj disigas la homojn unujn de la aliaj kaj kiuj ne sole malhelpas ilian normalan kaj naturan integriĝadon, sed kiuj rekte minacas plej serioze eĉ la pluan ekzistadon mem de la homaro kiel tia.

Unuiĝintaj Nacioj kaj aliaj interŝtataj organizaĵoj kreitaj tuj post la dua mondmilito, kiuj en la momento de la fondiĝo kaj dum kelka tempo post tio ŝajnis taŭgaj instrumentoj por solvado de la mondaj problemoj, montriĝis pli kaj pli senpovaj por fronti la grandajn, esencajn demandojn de la hodiaŭo, kio tamen ne signifas, ke ilia laboro kaj eĉ la plej etaj rezultoj, kiujn ili atingas, ne estas alte apreznadaj.

Ĝuste pro la senpoveco de Unuiĝintaj Nacioj en la aktuala situacio oni provis solvi la mondaferojn ankaŭ alimaniere, precipe per traktadoj sur t.n. altaj kaj plej alta niveloj, sed malmulto estis kaj estas farata por interkompreniĝo sur la nivelo la plej malalta, sed plej grava, de la ordinara homoj. Oni lanĉis formulojn de tia aŭ alia kunekzistado: paca, aktiva, konkurenca kunekzistado, aŭ kunekzistado tute simpla, sen ia ajn atributo, sed oni ne pretis cedi eĉ ereton de la absoluta ŝtata suvereneco, nek de la akiritaj pozicioj. Ĉiam temis kaj temas nur pri la kunekzistado de la ŝtatoj kaj multe malpli, aŭ eĉ neniom, pri amika, paca kunvivado de la popoloj, de la ordinara homoj. Kompreneble, oni povas kunekzisti diversmaniere. Ankaŭ sovaĝaj bestoj, ekzemple, kunekzistas unuj apud la aliaj en ŝtalaj kaĝoj en zoologiaj ĝardenoj. Kaj tio eble estas bona — eble por sovaĝaj bestoj en zoologiaj ĝardenoj. Sed ni esperantistoj opinias, ke la mondo ne estas zoologia ĝardeno; ni fidas, ke la homoj ne estas sovaĝaj bestoj kaj tial ni preferas internacian kunlaboradon de la homoj en frateco kaj libereco, ol la nuran kunekzistadon en la kaĝoj de politikaj limoj kaj lingvaj baroj.

La malkapablo solvi la esencon de la ĵus menciita fundamenta antagonismo de nia epoko kaj la efektiva malsukceso de aro da provitaj metodoj kaj rimedoj, kiuj ne povis esti io ajn alia ol nuraj paliativoj, ĉar ili ne frontis la problemon en ĝiaj radikoj, sed estis aplikataj sole al ĝiaj eksteraj malbonaj efikoj, manifestis plurajn negativajn fenomenojn en la spirita vivo. Diversaj ekscesoj de la junularo ĉie tra la mondo, sporadaj reviviĝoj tie kaj tie de naciismo kaj rasismo — kiu, pretere estu dirite, estas same kondamninda kiam ĝi estas antisemita, aŭ kiam ĝi estas direktita kontraŭ negrojn, flavulojn aŭ blankulojn — kaj ĉefe la apatio

de la amasoj, ĉio ĉi estas nur eksteraj simptomoj de tiu profunda seniluziigo kaj spirita malorientiĝo, kiu ekposedis la popolojn pro la malfeliĉa situacio en kiu ili vivas. Eĉ la moderna arto — tute egale ĉu ĝi estas de la speco, kiu pentras falantan neĝon tiel, ke ĉiu el la miliono da neĝeroj estas aparte pentrita, aŭ ĝi estas tiel abstrakta, ke du rektaj linioj kun du punktoj devus signifi virinon — eĉ do tiu moderna kaj de neniuj kompreneblaj artoj estas, ŝajnas al mi, esprimo de nia realaĵo. La kakofonio, kiu grandparte anstataŭis la harmonion en la muziko, la deformitaj linioj en la pentraĵoj kaj skulptaĵoj reflektas nur la konfuzon de tiu nuntempa homaro, kiu vivas kun unu piedo en abundo kaj brilaj perspektivoj por plia materia bonstato, kaj kun la alia piedo troviĝas sur la rando de la abismo.


Al ĉio ĉi aldoniĝas la fakto, ke gravaj sociaj movadoj de la 19-a kaj 20-a jarcentoj, kiuj havis internaciismon kiel unu el la esencaj elementoj de sia programo, transformiĝis iom post iom, preskaŭ nerimarkeble por la amasoj da sekvantoj, en diversformajn kaj diversgradajn naciismojn. La sloganoj kutime restis la samaj — frateco, libereco, internacia solidareco k.s. — sed la enhavo profunde ŝanĝiĝis, ĉar en la praktiko la naciisma elemento anstataŭis la internaciismon, kio kaŭzis, ke la etiketoj fariĝis falsaj kaj trompaj. En la komerco, se oni nomas ion per neĝusta nomo, la falsanto povas esti persekutata antaŭ tribunalo. En la sfero de ideoj la falsa nomado, eĉ konscie falsa nomado, ne povas esti traktata sammaniere, kio estas des pli danĝera, ĉar pro la persista forto de la vorto, la falseco ne povas esti tuj rimarkita. Kaj tiel povas okazi kaj efektive okazis, ke vastaj tavoloj de la popolo ĉie tra la mondo dum longa tempo fidis kaj parte ankoraŭ fidis, ke ili trinkas ĉampanvinon, dum en la realo ili englutis surogatojn aŭ eĉ tre acidan vinagron. Kiam fine la vero montriĝas en sia nudeco — ĉar, kiel prave iu diris, oni povas trompi iun la tutan tempon, oni povas trompi ĉiujn dum kelka tempo, sed oni ne povas trompi ĉiujn la tutan tempon — la seniluziigo estas des pli granda kaj des pli peza. Mi ne volas per tio diri, ke tiuj grandaj sociaj movadoj de diversaj nuancoj ne atingis ankoraŭ pozitivajn rezultojn. La pliboniĝo de la vivnivelo de la laborantaj homoj en multaj landoj certe ŝuldiĝas grandparte al la klopodoj de tiuj movadoj, kiuj finfine ĉiam pli kaj pli centriĝis sian aktivecon precize kaj preskaŭ ekskluzive al tiu tasko. Kion mi deziras akcenti estas la fakto, ke, rezigninte pri inter-

naciismo, ili ne povis atingi la fundamentan celon: krei mondon de interpopola frateco kaj garantii daŭran materian kaj spiritan prosperadon en paco kaj amikeco. El tiu vidpunkto ili bankrotiĝis kaj ĝuste tial ili ĉesis esti inspiraj kaj esperigaj por la amasoj, tute speciale por la nova postmilita generacio.

III

Ĉu do la situacio estas vere tiel tragika, kiel unuavide ŝajnas? Ĉu efektive la homaro ne trovas eliron el tiu ĉi baza antagonismo, kiu disŝiras ĝin, ĉar tute simple eliro ne ekzistas? Ĉu la ideo de internaciismo, de tiu nobla humanisma internaciismo komprenebla kiel frateco de la rasoj, nacioj, popoloj kaj unuopuloj en plena libereco kaj egaleco, efektive tiel seniluziige malsukcesis pro kaŭzoj entenataj en la koncepto mem de la internaciismo, aŭ la vera kaŭzo troviĝas aliloke?

La internaciismo en la ĵus determinita senco estis la idealo ne nur de milionaj amasoj, sed ankaŭ de la plej elitaj intelektuloj, kiuj fidis je ĝi, agis por ĝi, oferis pro ĝi. Ideo, kiu — tute egale ĉu ĝi estas konsista parto de tiu aŭ alia religio, ideologio aŭ socia movado, aŭ tute simple internaciismo kiel tia en sia pura formo — povas entuziasmigi milionojn kaj al kiu la plej klarvidaj mensoj povas dediĉi la aktivecon de sia tuta vivo, ne povas esti nerealegebla per si mem. Se tia ideo malsukcesas, estas pli ol danĝere proklami ĝin malebla kaj tial utopia, sen plia esploro, ĉar tia defetisma starpunkto nur plue prokrastas, malhelpas aŭ eĉ malebligas la solvon. Esplorante la aferon pli profunde, oni trovas la veran kaŭzon de la malsukceso. Ĝi estas la manko de komuna tuthoma lingvo. Ne povas ekzisti internaciismo sen reciprokaj kontaktoj de la homoj, sen spirito de komprenemo kaj respekto, sen evoluigo de sentoj pri aparteno, krom al



La Inaŭguro de la 45-a en la Palaco de la Belaj Artoj.

sia regiono kaj al sia nacio, ankaŭ al la granda kolektivo: la homaro. Kaj tiun spiriton kaj tiujn sentojn oni ne povas atingi sen lingvo komune homa, sen lingvo esence ligita ĝuste al realigo de tiu celo. Evidente, interkompreniĝi oni povas — pli aŭ malpli bone — ankaŭ per la naciaj lingvoj kaj eĉ per signoj kaj gestoj. Sed estas esenca diferenco el vidpunkto de internaciismo kiu lingvo estas uzata. La instrumento utiligata por iu celo devas esti konforma precize al la bezonoj de la celo. Oni povas ludi serenadojn per mandolinoj kaj gitaroj, sed la simfoniojn de Beethoven oni kree reproduktas per aliaj instrumentoj! Kaj tie — precize tie — troviĝas la kaŭzo de la provizora malsukceso de la moderna internaciismo. Ne la ideo estas utopia, sed utopie estis kaj estas esperi, ke sen komuna, neŭtrale homa lingvo, sen la Internacia Lingvo, humanisma internaciismo estas entute realigebla.

Ke estas tiel, montras movado ne politika kaj ne religia, sed praktikanta la plej puran, la plej humanisman internaciismon per la uzo de la Internacia Lingvo. La Esperanto-Movado estas la sola kultura kaj socia internacia movado, kiu super la tempestoj kaj uraganoj de la nuntempo, super la tensioj kaj malstreĉiĝoj de varmaj kaj malvarmaj militoj, super ĉiuj sporadaj fluktuadoj ne nur ne estas infektita de malespero kaj defetismo, sed male fortikiĝis kaj progresis en la pritraktata periodo, de la lasta jardeko. Ĉi tie estas nek la loko, nek la momento por rememorigi la diversajn atingojn de la lastaj jaroj, sed sufiĉas menciigi ke la nombro de la membroj de UEA pli ol duobligis ekde 1950 kaj ke la prestiĝo de Esperanto en la ekstera mondo tiel altiĝis, ke en 1954 UNESKO ne povis ne rekoni la signifon de la Internacia Lingvo por la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la monda paco, kaj ke en 1959 la Plenuma Komitato de tiu sama organizaĵo decidis, ke la aŭtoro de Esperanto, D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof, estu celebrata kiel unu el la grandaj personecoj de la homaro. Tiu decido, kiu signifas ne nur la plej altan honorigon por la nomo Zamenhof, sed ankaŭ plian rekonon al la grandeco de lia verko kaj al la

idealaj de interhoma frateco ligitaj kun la lingvo mem, estis farita unuanime kaj estas por mi granda plezuro diri ĉi tie, ke al tio kontribuis ankau la interveno de la belga reprezentanto, kiu samtempe esprimis la starpunkton de la nederlanda UNESKO-Komisiono. Mi utiligas la okazon por esprimi ankoraŭfoje al la vivantaj membroj de la familio Zamenhof nian plej koran gratulon pro tiu honorigo.

La Esperanto-Movado gvidata de UEA, ĝiaj landaj, lokaj kaj fakaj organizaĵoj fariĝis hodiaŭ la bastiono de internaciismo. Ĝi jam estas tiel forta, ke ĝi povas entrepreni novan grandan kampanjon, ĉifoje por konsiderinda vastigo de la instruado de Esperanto en la lernejoj, kaj ke en siaj klopodoj ĝi komencas altiri la atenton de ĉiuj sinceraj humanismaj kaj internaciismaj fortoj en la mondo. Tiu nova pozicio devigas ankaŭ al novaj respondecokoj. Ju pli grava estas la rolo de iu movado, ju pli da fido ĝi ĝuas, des pli da sindono, takto, inteligento estas postulataj por ne perfidi la fidojn kaj ne detrui la formiĝantajn novajn esperojn.



La hodiaŭa mondo ne plu havas multajn vojojn antaŭ si por elekti. Ekzistas nur du vojoj. Unu fatala kondukas al plena detruigo, al malapero; la alia kondukas al plia prospero en frateco, egaleco kaj libereco. Ni, la ordinaraĵoj, la simplaj homoj deziras iri laŭ tiu dua vojo. Ju pli baldaŭ kaj ju pli rapide, des pli bone. Kaj en tiu irado ni esperantistoj, organizitaj en ĉiam pli fortaj organizaĵoj, devas fariĝi la avangardo, tiu taĉmento, kiu venkas la obstaklojn, por ke la aliaj povu progresi pli facile. Rompante la lingvajn barojn kaj kreante samtempe sentojn tuthomajn kaj pensmanieron mondan, ni detruas la ĉefan obstaklon al la venko de humanisma internaciismo, kiu sola povas ne nur savi la homaron, sed ankaŭ doni al ĝi en la plej baldaŭa estonteco vivĝojn kaj feliĉon neniam spertitajn ĝis nun. Kun tiuj sentoj de nova respondecokoj ni komencu la laborojn de nia 45-a Universal Kongreso de Esperanto.

LA INAŬGURO

En la impona salonego de la Brusela Palaco de la Belaj Artoj kolektiĝis dimanĉmatene la kongresanaro kunveninta el 42 landoj kaj kvin kontinentoj por tiu tradicia kaj en sia speco unika solenaĵo, kiu estas la Oficiala Inaŭguro.

Post kiam prenis lokon sur la vasta podio la reprezentantoj de la landaj asocioj, plenigis ĝian fonon kiel ondo granda fluo de feste aspektantaj infanoj: 87 geknaboj el 10 landoj, partoprenantaj la Infankongreseton. Post sidiĝo ankaŭ de la Kongresa Prezidentaro kaj aŭtoritatuloj knabeto per klara voĉo salutis la 45-an Universalan Kongreson

en la nomo de la 5-a Infana Kongreseto, kion sekvis ĥora saluto de la tuta infanaro. Ricevinte varmajn bondezirojn por sia Kongreseto flanke de la Prezidanto, la infanoj forlasis la scenejon subkora aplaŭdo.

Ĉeestis la Inaŭguron la Honora Prezidanto de la 45-a U.K. kaj estinta ĉefministro Sinjoro Van Acker, kiu en simpatiplena parolado esprimis sian fidon je la movado kaj sian konvinkon pri la nepre bezono de internacia komprenilo.

Envenis letero en la nomo de lia Moŝto Baŭduino, Reĝo de la Belgoj, kaj telegramoj de la Ho-

noraj Prezidantoj de U.E.A. Prof. Edmond Privat kaj Generalo Bastien. En siaj malfermaj vortoj la vic-prezidanto de U.E.A., Sinjoro Harry W. Holmes O.B.E. komunikis kun bedaŭro, ke pro subita malsaniĝo Prof. D-ro Giorgio Canuto, Prezidanto de U.E.A., ne povas ĉeesti. Li voĉlegis bondeziran telegramon de la Prezidanto, kiun la Kongreso kun varmaj sentoj reciprokis.

Mallongajn paroladojn faris reprezentantoj de resp. la franca Ministro de Edukado, la Germana Registaro, la Indonezia Ministro de Edukado, la Nederlanda Registaro, la Ĉefministro de Nov-Zelando, la Sveda Registaro kaj la Usona Departemento pri Informado.

Fortan entuziasmon vekis la salutvortoj de Ing. Ludoviko Zamenhof en la nomo de la Zamenhofa familio. Alparolis la Kongreson en Esperanto ankaŭ la estinta blanka kronprinco de Serawak, Kavaliro Anthony Brooke, kiu esprimis sian fortan konvinkon pri la neceseco de la Internacia Lingvo por la konstruo de daŭra paco.

Sekvis kalejdoskope la salutvortoj nome de la aliĝintaj landaj asocioj aŭstralia (Frank Taylor), aŭstria (Mag. F. Höfert), belga-flandra (G. Debrou-

were), brita (D. Kennedy), bulgara (Ivan Sarafov) dana (Erling Knudsen), finna (V.J. Kostianen), franca (R. Llech-Walter), germana (K. Deubler), hispana (A. Figuerola), indonezia (S-ino Datoe Toemenggoeng), itala (F. Bertolotti), japana (D-ro Minesita), jugoslavia (S-ino Emilija Lapenna), maroka (Moghrel Abdelkader), monaka (L. Sauvaigo), nederlanda (E. de Wolf), norvega (C. Støp-Bowitz), nov-zelanda (D-ro J. Hamvai), pola (D-rino Szablowska), sveda (O. Svantesson), svisa (J. Sturzenegger), usona (F-ino Ida Bella Craig), kaj de landaj asocioj ne-aliĝintaj irlanda (L. OhUginn) kaj israela (B. Swarsenski).

Kulminon atingis la inaŭgura solenaĵo en la festparolado de Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario de U.E.A., admirinda laŭ formo, inspira laŭ prezento, konvinka laŭ enhavo, kies konkludo estis la konstato, ke la ĝisnuna malsukceso de diversspecaj internaciismaj movadoj estas ŝuldata al la manko de komuna lingvo en tiuj movadoj. (La festparolado estas presita sur paĝo 141 k.s.)

Enkadrigis la programerojn brila orgenludo de S-ro Verrees, kio donis altan etoson al la tuta solenaĵo.

LA DUMKONGRESA LABORO DE U.E.A

ĈEFAJ DECIDOJ DE LA KOMITATO KAJ ESTRARO

La Komitato de U.E.A. havis dum tiu ĉi Kongreso du tuttagajn kunsidojn: sabaton de la 10-a ĝis la 19-a horo kaj merkredon de la 14-a ĝis la 23-a horo. Ĝi finis tagordon de 34 punktoj kaj subpunktoj kaj traktis por tio dokumentaron de 62 multobligitaj kaj 68 presitaj paĝoj. Ĉeestis la kunsidojn entute 39 komitatanoj aŭ anstataŭantoj.

La ĉefaj decidoj estas la jenaj:

1. *Komitatano C.* La komitatanoj A kaj B alektis kiel komitatanon C la redaktorinon de la revuo "Esperanto", S-inon Kirsten Zacho.

2. *Honora Membro.* La Komitato decidis unuanime nomi Sinjoron David Kennedy Honora Membro de U.E.A.

3. *Honora Patrono.* Same ĝi decidis unuanime nomi Prof. D-ron Björn Collinder membro de la Honora Patrona Komitato de U.E.A. (Pri ambaŭ nomigoj detaloj troviĝas aliloke en tiu ĉi numero).

4. *Ekzamena Komisiono.* Al la Internacia Ekzamena Komisiono estis elektitaj kiel pliaj membroj Ing. J.R.G. Isbrucker kaj S-ro J. H. Rosbach.

5. *Ĝenerala Regularo.* La Komitato akceptis la jenajn aldonajn artikolojn en la Ĝenerala Regularo de la Asocio:

"29. *Elekto de Komitatanoj C.* Konforme al la art. 24 kaj art. 25 (C) de la Statuto, la komitatanoj A kaj B povas elekti pliajn komitatanojn C ĝis kvarono de sia propra nombro. Almenaŭ 3 komitatanoj A aŭ B rajtas proponi unu aŭ plurajn kandidatojn el inter la elstaraj membroj de la Asocio, kiuj pro siaj scioj, spertoj kaj laboro povas efektive kaj aktive helpi al la agado de la Asocio. La kandidato devas skribi konsenti al sia kandidatigo.

30. *Kondiĉo por Komitataneco.* Povas esti elektita kiel komitatano A, B aŭ C nur persono, kiu estis Membro-Abonanto de UEA almenaŭ dum la 3 jaroj antaŭ la jaro de la elektoj. Tiu regulo ne validas nur por la ĵus aliĝintaj landaj asocioj rilate la komitatanojn A por la unua periodo, kiuj tamen devas esti Membroj-Abonantoj almenaŭ unu jaron antaŭ la elekto".

6. *Lerneja Kampanjo.* La Komitato traktis la raporton de Sinjoro Malmgren pri Esperanto kiel baza lingvo kaj esprimis al li sian dankon pro la granda laboro farita. La Komitato decidis daŭrigi ĉi tiun agadon, ĉar ĝi estas precipe grava kaj efika en landoj, kie la aŭtoritatuloj estas speciale favoraj al la lernado de pluraj naciaj lingvoj en la lernejoj. Krome, la Komitato decidis intensigi la kampanjon por atingi interŝtatan konvencion por la instruado de la Internacia Lingvo Esperanto. Multaj landaj asocioj jam nomis specialajn komisiitojn por tiu ĉi kampanjo. Ambaŭ agadoj okazu paralele.

7. *Informado.* La Komitato traktis la nuntempan staton de la Informado pri Esperanto. Ĝi akcentis, ke kelkaj Informaj Fakoj bonege funkcias, sed ke en pluraj aliaj landoj ili estas ankoraŭ plibonigendaj. Plue ĝi emfazis, ke la kvalito de la informado estu ankoraŭ altigata surbaze de la principaro de Frostavallen.

8. *A.P.O.* La Komitato aŭdis raporton pri la laboroj de la gvidanto de A.P.O., S-ro Tibor Sekelj, kaj de S-ino Haudebine, kiu agas speciale en New Delhi. La Komitato esprimis sian dankon kaj gratulon pro la bonega laboro de tiuj ĉi sindonaj funkciuloj.

9. *Azio kaj Afriko.* Pro la kreiĝo de multaj novaj sendependaj ŝtatoj en Azio kaj Afriko, en tiuj mondpartoj nuntempe tre forte sentiĝas la bezono de neŭtrala komuna lingvo. La Komitato decidis entrepreni en tiuj landoj specialan agadon sur la plej alta nivelo kaj komisiis al S-ro Tibor Sekelj entrepreni la preparlaborojn en interkonsento kun la Ĝenerala Sekretario. Ĝi malfermis krediton ĝis 10.000 gld (40.000 steloj) el la Garantia Fondaĵo — ja destinita por eksterordinaraj propagandaj agadoj — por realigo de tiu nova plano.

10. *Estrara Raporto.* La Komitato detale diskutis la Estraran Raporton — kiun ricevis ĉiu kongresano en presita formo — kaj akceptis ĝin kun kelkaj malgrandaj ŝanĝoj, esprimante apartan dankon al la Ĝenerala Sekretario, Prof. I. Lapenna, pro la ampleksa laboro farita.

11. *Financa Raporto.* La Financa Komisiono, nomita en la unua kunsido kaj konsistanta el S-roj Woessink (prezidanto), Becker, Maertens, Minnaja kaj Thierry, trastudinte ĉiujn financajn dokumentojn, prezentis en la dua kunsido sian raporton al la Komitato. Tiun raporton la Komitato akceptis, kaj per tio ĝi malŝarĝis la direktorion de la C.O. pri la financoj de 1959. La Komitato konstatis kun aparta ĝojo, ke duan fojon sinsekve la jaro finiĝis sen deficito, kio estis atingita ĉefe dank' al la enspezoj de la Varsovia kongreso.

12. *Kotizoj.* La Komitato konstatis, ke en la venontaj jaroj tiaj enspezoj pro kongresoj ne estas antaŭvideblaj kaj ke, krome, ĉiuj elspezoj daŭre altiĝas. Ĝi konstatis ankaŭ, ke ne plu estas proporcio inter la kotizoj kaj la kostoj de 24-paĝa revuo kaj ampleksa jarlibro. La Komitato tre serioze pristudis du buĝetproponojn, unu sen kaj la alian kun kotizaltigo. Ĝi venis al la konkludo, ke kotizaltigo ne estas evitebla, akceptis la duan buĝetproponon kaj decidis altigi ĉiujn individuajn kotizojn 1961 per 20% de la nunaj kotizoj.

13. *Estraro.* La estrarano pri financoj, Sinjoro R. Llech-Walter deklaris, ke pro sia grandega okupiteco kiel prezidanto de loka, regiona kaj landa organizaĵoj kaj gvidanto de multaj lernejoj kursoj, kiel ankaŭ pro la distanco inter lia loĝloko Perpignan kaj la C.O. en Rotterdam, ne estas eble

al li plue plenumi sian funkcion en la Estraro de U.E.A. kaj prezentis sian demision. La Komitato esprimis dankon al S-ro Llech-Walter pro la farita laboro kaj montris komprenemon pri la situacio. Ĝi elektis kiel novan estraranon pri financoj Sinjoron E. J. Woessink el Nederlando, kiu povas regule viziti la C.O. kaj estas profesiulo pri financoj.

14. *Kontrolantoj.* La Komitato nomis kiel kontrolantojn de la kontoj en la C.O. Sinjorojn Albers (Nederlando) kaj Maertens (Belgujo), de la konto en Londono Sinjorojn Parker kaj Rapley (ambaŭ Britujo) kaj de la konto en Stokholmo Sinjorojn Strönne kaj Tornskog (ambaŭ Svedujo).

15. *Landaj Asocioj.* La Komitato akceptis unuanime kiel novajn asociojn aliĝintajn, kies Statuto estas konforma al la Statuto de U.E.A., la Helenan Esperanto-Asocion kaj la Kanadan Esperanto-Asocion. Ambaŭ asocioj havos observanton en la Komitato.



La Estraro de U.E.A. kunsidis jam dum la antaŭkongresa vendredo kaj daŭrigis sian laboron mardon matene, merkredon matene kaj vendredon vespere ĝis la 1-a horo nokte. Ĝi havis tagordon de 43 punktoj kaj subpunktoj. El la ĉefaj decidoj ni citas la jenon :

1. *Jubileo Andreo Cseh.* La Estraro decidis honorigi en la Unua Ĝenerala Kunsido de la Kongreso Sinjoron Cseh, kiu ĉijare festas trioblan jubileon : 50-jaran esperantistecon, 40-jaran ekzistadon de la Cseh-metodo kaj 30-jaran ekzistadon de la Internacia Esperanto-Instituto, fondita de li kune kun Ges. Isbrucker. La Estraro decidis donaci al li ekzempleron de la Memorlibro kun subskriboj kaj koverton kun enhavo, uzota laŭ lia elekto.

2. *Eldonaĵoj.* Nova numero de Belarto aperos antaŭvideble en la fino de 1960, sed kun indiko de la jaro 1961. "Esperanto" aperos ankaŭ venontjare en la sama amplekso kaj formato. Ĵus antaŭ la Kongreso aperis la Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro, pro kiu estas gratulinda la Direktoro de C.E.D., kiu redaktis ĝin. En la serio "Oriento-Okcidento" kiel unua numero baldaŭ aperos verko de Tagore, dum Kalevala estas en preparo kaj pluraj aliaj numeroj estas planataj. Krom pri tiuj verkoj, U.E.A. okupiĝos precipe pri eldonado de Antologioj, se en la koncernaj landoj mem la necesaj rimedoj kaj helpo ne estas troveblaj. Salutinda estis la informo, ke la Dana Antologio estos baldaŭ eldonita kun subvencio de la dana registaro, dum la Ĉina Antologio ĵus aperis.

3. *Oriento-Okcidento.* La Estraro donis sian moralan apogon al la plano pri organizo de Seminario pri Oriento-Okcidentaj Kulturaj Interŝanĝoj en la kadro de Antaŭkongreso en Londono en 1961.

Kiam estos prezentita konkreta programo, ĝi decidus pri la aŭspicio de U.E.A. por tiu aranĝo.

4. *A.P.O.* La Estraro decidis disponigi por A.P.O. plian sumon de 2000 gld (8000 steloj) por ebligi la vojaĝon de unu aŭ du pliaj instruistoj al Hindujo.

5. *Prelegvojaĝoj.* La Estraro faris principan decidon pri kondiĉoj, sub kiuj U.E.A. konsentos estonte aŭspiciojn pri prelegvojaĝoj.

6. *U.K. 1961.* Estis decidite, ke en Harrogate dum la Kongreso okazos Internacia Arta Festivalo kun teatraj kaj muzikaj prezentadoj el diversaj landoj, ekspozicioj de pentraĵoj, skulptaĵoj, fotografiaĵoj ktp. Pro pluraj cirkonstancoj la kotizoj por tiu kongreso devos esti £ 3.15.0, sed la elspezoj por restado estos konsiderinde malpli altaj ol en la lastaj kongresurboj.

7. *U.K. 1962.* Ĉar ankoraŭ ne venis invito por tiu jaro, la Estraro alvokis la kongresanojn serioze esplori la eblecojn por Universala Kongreso en iliaj urboj aŭ landoj.

8. *U.K. 1965.* Principa decido pri Tokio estis farita jam pli frue. La Japania Esperanto-Instituto verŝajne faros la oficialan inviton kun ĉiuj detaloj post la venonta Japania Esperanto-Kongreso.

9. *Informado:* La Estraro decidis pri reeldono de la konata Seslingva Flugfolio, kiu estas preskaŭ elĉerpita. Plue, ĝi helpas la eldonon de plurlingva flugfolio por universitataj medioj, kiun preparas S.T.E.L.O. La Estraro principe decidis pri eldono de populara broŝuro pri Esperanto kun taŭgaj rebatoj de la kutimaj argumentoj aŭ pseŭdo-argumentoj kontraŭ la lingvo. Fine, la Estraro planas eldonon de nova dokumento de CED, simila al la "Sepdek Jaroj de la Internacia Lingvo", kiu estis distribuita en pluraj dekmiloj da ekzempleroj en diversaj lingvoj.

10. *Biblioteko.* Mallonge antaŭ la Kongreso alvenis en la Centran Oficejon en Rotterdam la unua parto de la biblioteko de la Asocio, troviĝanta en Ĝenevo. La Estraro urĝigos la sendon ankaŭ de la tuta cetera materialo apartenanta al la biblioteko, por ke troviĝu ĉio kompleta en la C.O.

11. *Organizaĵoj kaj funkciuloj.* La Estraro plue klopodos, por ke aliĝu pliaj landaj kaj fakaj asocioj al U.E.A. aŭ ke pliaj fakaj regule kunlaboru kun ĝi surbaze de kontrakto. Ĝi apelacias al ĉiuj membroj-fakuloj aktivigi siajn fakajn organizaĵojn tiurilate kaj mem fariĝi fakdelegitoj pri la propraj profesioj, tiel ke la delegita reto fariĝu ĉiam pli vasta kaj utila.

12. *Unesko.* La venonta Ĝenerala Konferenco de Unesko okazos en novembro-decembro ĉijare en Parizo. Kiel antaŭe, la oficiala observanto de U.E.A. estos la ĝenerala sekretario Prof. Ivo Lapenna kaj lia anstataŭanto estos S-ro J. Thierry.

13. *Eŭropa kampanjo.* D-ro W. Herrmann plue gvidos tiun agadon. La Kulturkomisiono de la Eŭropa Konsilantaro, kiu havas en sia tagordo la lingvoproblemon, kunvenos denove en venonta septembro.

14. *Servoj de U.E.A.* Dum la Magnetofona Servo bonege funkcias sub la kompetenta gvidado de S-ro Eichholz en Kanado, la Filma Servo kaj la Koresponda Servo stagnis dum iom da tempo, ĉar la koncernaj gvidantoj pro diversaj cirkonstancoj ne povis plenumi la laboron. Por ambaŭ servoj tre verŝajne anstataŭantoj estas trovitaj kaj baldaŭ iliaj nomoj povos esti publikigitaj.

ĜENERALAJ KUNVENOJ

Antaŭ ol raporti pri la laboro de la kunsidoj mem estas plezuro diri, ke la Estraro de UEA povis uzi la okazon por transdoni al S-ro Andreo Cseh Zamenhofan Memorlibron kun monenhava koverta. La Vic-Prezidanto, S-ro Holmes, per varma parolado honoris ĉi tiun unikan personecon en la movado, okaze de liaj jubileoj. La ĉeestantoj entuziasme akklamis.

Dum la unua kunsido oni parolis pri "Lastatem-paj Atingoj de la landaj kaj fakaj Asocioj" kaj montriĝis, ke tre ampleksaj klopodoj antaŭenigi nian aferon okazadas. En konciza raporto nur eblas resumi kelkajn elstarajn punktojn, sed espe-reble la plej gravaj sukcesoj estos la temo de apartaj raportoj en la plej taŭgaj medioj. Funk-cias kaj evoluas la tradukservo de ISAE por scien-caj artikoloj. La Geografia Asocio planas ekspe-dicion al Assuan por partopreno en la grava kon-serva laboro tie. Andreo Cseh raportis pri la novaj stelmoneroj. En pluraj faksocietoj okazas utila ter-minara laboro kaj kelkaj, precipe la jurista, bone kontaktiĝas kun ne-esperantistaj fakuloj. La Nor-vega Asocio raportas pri la regula uzo de infor-milo pri lernejoj, kiun ili sendadas al lerne-joj kaj pri sukcesaj metodoj por reteni komencan-tojn en la movado kaj apliki gazetajn kursojn. En Hindujo, Japanujo kaj Indonezio la movado pro-gresas kaj la Indonezia reprezentanto aparte petis, ke UEA sendu komisiiton el la Okcidento por kura-ĝigi la laboron tie. La studentoj kaj maristoj aktive laboras en siaj respektivaj medioj. La dana ligo baldaŭ aperigos "Danan Antologion", parte sub-venciitan de la Ŝtato. En unu lando oni kunligis la laboron inter studentoj kun la jaro de la Rifu-ĝintoj pagante sumon en tiun kason kondiĉe ke grupo de studentoj lernu Esperanton dum 12 horoj. Multaj plej diversaj raportoj tenis la intereson de la ĉeestantoj.

Dum parto de la dua kunsido oni ankaŭ diskutis la Estraran Raporton. Evidente kontentaj pri la laboro farita, oni diskutis nur mallonge kaj kritikoj mankis. Oni pledis, ke pli multaj grupoj prenu la okazon presigi informon pri si en la Jarlibro. Plue, oni aŭdis raportojn pri la dumkongresaj laboroj de diversaj fakaj asocioj.

LA LABORO DE LA SEKCIOJ

Unua sekcio

Lundon matene je la 10-a horo komenciĝis la laboro de la Unua Sekcio, kiu pritraktis la temon "Esperanto en la Lernejoj". Prezidis Prof. D-ro Ivo Lapenna kaj ĉeestis pli ol 300 kongresanoj. La tagordo de la Sekcio kaj la resume de la enkonduka raporto estis presitaj en la Kongresa Libro. Tio, kiel ankaŭ la fakto, ke ĉiu ĉeestanto ricevis la novan dokumenton de CED (CED/Int./10) kun la plej freŝdataj informoj pri la nuna stato de Esperanto en la lernejoj, faciligis la laboron.

Unue la prezidanto faris la enkondukan raporton, en kiu li koncize prezentis la historion de la klopodoj enkonduki Esperanton en la lernejojn ekde la Kongreso en Bulonjo sur Maro ĝis niaj tagoj. La nuna klopodo baziĝas sur la decido de la Komitato de U.E.A. de la 15-a de decembro 1959, kiu efektive signifas plenumon de la Kongresa Rezolucio de Varsovio. La organiza skemo de la agado estas: gvida centro por la tuta mondo, landaj komisionoj kaj komisiitoj. La celo estas popularigi la kampanjon inter la esperantistoj; popularigi la ideon inter la neesperantista publiko; entrepreni la necesajn paŝojn ĉe la edukaj aŭtoritatoj. La tri taskoj devas esti plenumataj paralele kun la fina celo atingi interŝtatan konvencion de pluraj ŝtatoj por enkonduko de deviga instruado de Esperanto en la lernejojn. Estas jam farita konsiderinda laboro kaj ellaborita la unua projekto de la konvencio. En diversaj landoj formiĝis apartaj komisionoj, dum en aliaj unuopaj kompetentaj esperantistoj estas komisiitaj prizorgi la agadon sur sia teritorio.

Sekvis la raporto de S-ino Sonja Tavĉar pri la konkludoj de la ĵus okazinta Somera Pedagogia Semajno en Bohinj (Jugoslavio). La raporto estis multobligita kaj disdonita al la ĉeestantoj antaŭ la kunveno. El tiu interesa raporto sufiĉos menci, ke en Jugoslavio Esperanto nun estas instruata en 127 diversgradaj lernejoj kun entute preskaŭ 4000 gelernantoj.

Post tio la reprezentantoj de la landaj komisionoj kaj la komisiitoj raportis pri la lastmomentaj rezultoj atingitaj sur tiu ĉi kampo. Prof. D-rino Szablowska informis, ke ankaŭ en Pollando la lingvo estas instruata en multaj lernejoj, ĉefe por geinstruistoj. Projekto pri enkonduko de Esperanto en pliajn 50 lernejojn estas transdonita al la respektiva ministro, kaj la kompetenta departemento nun prilaboras la aferon kun la celo realigi la planon. Laŭ la ĵus farita statistiko, en Pollando troviĝas 360 geinstruistoj kompetentaj por instruado de la Internacia Lingvo. S-ro A. Ribot (Francujo) informis pri la multnombraj prelegoj pri Esperanto faritaj en la francaj lernejoj. Rezulte de tio en multaj lernejoj lastatempe malfermiĝis novaj kursoj. S-ro C. Støp-Bowitz (Norvegujo) raportis pri la klopodoj en sia lando kaj

ankaŭ informis pri la formiĝo de Skandinavia Komitato, kies tasko estos harmoniigi la laboron en la skandinaviaj landoj. S-ro Sven Ziegler (Danlando) raportis pri la organizo de la kampanjo en Danlando kaj aparte akcentis la popularigon de la ideo en la dana gazetaro. S-ro Werner Murza (Germanujo) parolis en la nomo de la Germana Lerneja Komisiono kaj akcentis la malfacilaĵojn de la laboro en tiu lando pro la fakto, ke la edukaj aŭtoritatoj en la unuopaj partoj de Germanujo ĝuas sendependecon kaj tio malhelpas la agadon rilate la interŝtatan konvencion.

La prezidanto atentigis, ke oni renkontas similajn malfacilaĵojn ankaŭ aliloke, ekzemple en Kanado, Britujo kaj en aliaj landoj. S-ino Burger (Nederlando) parolis pri la peticio favore al Esperanto ĵus transdonita al la edukaj instancoj de Nederlando. S-ino Emilija Lapenna informis pri tre efika seminario en Zagreb, realigita per minimumaj rimedoj.

Sekvis vigla diskuto, en kiu partoprenis pluraj kongresanoj. Fine, la prezidanto proponis tekston de rezolucio, kiu estis unuanime akceptita. La rezolucio mem formas parton de la Kongresa Rezolucio, kiun ni publikigas aliloke.

La laboro de la sekcio estis intensa kaj la diskuto sur alta nivelo. Tio ŝuldiĝas parte al la bonaj antaŭpreparoj kaj parte al la graveco de la demando, kiu estis traktata kun adekvata seriozeco.

Dua sekcio

Vendredon posttagmeze, la 5-an de Aŭgusto, la dua Sekcio kunvenis por diskuti "Kontribuo de Esperanto al la Granda Projekto de U.N.E.S.C.O. 'Oriento-Okcidento' ". Raportoj pritraktis la multan agadon en ĉi tiu kadro farata tra la mondo pere de Esperanto. Pluraj gravaj verkoj eldoniĝis inkluzive de granda Ĉina Antologio. Okazis ses prelegvojaĝoj aldone al pluraj interlandaj vizitoj. Du seminarioj okazis dediĉitaj al ĉi tiu temo kaj en tre multaj grupoj kaj landoj oni aranĝis programojn aŭ prelegseriojn, ĉu en Esperanto, ĉu en la nacia lingvo uzante informojn ricevatajn pere de Esperanto. Fondiĝis Esperantistaj societoj de *Amikoj de Afriko kaj Azio* kaj oni decidis intensigi tiun laboron. Libro en la serio *Oriento-Okcidento* baldaŭ estos antaŭmendeblaj kaj aparta anonco aperos pri tio. El la granda amaso de agado raportita eblos pretigi traktaĵon pri la apliko de Esperanto al ĉi tiu celo por uzo kiel fidinda atesto pri nia agado. La sekcio akceptis rezolucion kiu fariĝis konsistiga parto de la

KONGRESA REZOLUCIO

En la Ferma Kunsido la Kongreso unuanime kaj per aplaŭdo akceptis la decidojn de la du sekcioj, kiuj estis kunigitaj kiel Kongresa Rezolucio por interna uzo de la Esperanto-Movado. Ĝi tekstas:

La Unua Sekcio "Esperanto en la Lernejoj"

(1) aŭdis kun aprobo la raportojn pri la nuna stato de Esperanto en la lernejoj kaj pri la klopodoj vastigi la instruadon de la Internacia Lingvo en la lernejoj;

(2) rekomendas al U.E.A. daŭrigi la kampanjon "Esperanto kiel Baza Lingvo" kaj intensigi la klopodojn por subskribo de Interŝtata Konvencio laŭ la decido de la Komitato de la 15-a de decembro 1959, prenante en konsideron, laŭ la eblecoj kaj cirkonstancoj, la sugestojn entenitajn en la Raporto de la Internacia Pedagogia Semajno en Bohinj kaj en la raportoj de la landaj komisionoj kaj komisiitoj de diversaj landoj;

(3) rekomendas ankaŭ al I.L.E.I. kaj T.E.J.O. konsideri la proponojn de la Internacia Pedagogia Semajno, kiom tiuj proponoj koncernas la du organizaĵojn.

La Dua Sekcio "Kontribuo de Esperanto al la granda projekto de UNESKO Oriento-Okcidento" konstatas, ke la ĝis nun realigita interŝanĝo de esperantistaj prelegantoj inter Oriento kaj Okcidento estis fruktodona por

la interkompreniĝo de la popoloj; ke esperantistaj grupoj en pluraj urboj organizas prelegojn kaj ekspoziciojn, kiuj favoras amikecon al Afriko kaj Azio kaj evoluigas utilan kulturen agadon; sekve rekomendas:

(1) ke en kiel eble plej multaj lokoj la esperantistaj grupoj, kunlabore kun aliaj interesitoj, ankaŭ neesperantistoj, inkluzive la Naciajn UNESKO-Komisionojn kaj la Ambasadajn, fondu en okcidentaj landoj societojn de amikoj de Azio kaj Afriko, kaj sur tiuj kontinentoj societojn de amikoj de Okcidento;

(2) ke tiuj societoj interŝanĝu prelegojn, sonbendojn, lumbildojn, filmojn kaj ekspozician materialon, kaj eventuale organiziĝu en Federacion, kiu povus plenumi gravan kulturen laboron pere de Esperanto;

(3) ke la lokaj grupoj kaj landaj asocioj esploru la eblecon kaj faru konkretajn proponojn pri interŝanĝo de personoj inter orientaj kaj okcidentaj landoj, — de kursgvidantoj kaj aliaj personoj — kies ĉeesto en la grupo kaj lando antaŭenigos la kulturajn interŝanĝojn inter Oriento kaj Okcidento kaj tiel servos al la celoj de la Esperanto-Movado".

ĈEFAJ KULTURAJ ARANĜOJ

INTERNACIA SOMERA UNIVERSITATO

La 13-a Sesio de la Internacia Somera Universitato konsistis el 9 prelegoj. Estis antaŭviditaj 10 prelegoj, sed Prof. Ing. Pancer ne povis ĉeesti la Kongreson kaj tiel nur 9 prelegantoj lekciis.

La Rektoro de la ĉijara sesio, Prof. D-ro M. Roost, malfermis la sesion sabaton vespere je la 19-a h. per parolado en kiu li akcentis la gravecon de la institucio kaj omaĝis al Prof. D-ro Hugo Sirk, kiu forpasis antaŭ nelonge. La sekretariino de I.S.U., F-ino M. Boulton, diris kelkajn vortojn pri la konata fizikisto el Vieno, kiu faris multajn prelegojn en la I.S.U., precipe en la postmilita periodo. Ŝi legis poemeton de li verkitan.

La unua preleganto estis S-ro C. Stop-Bowitz, kuratoro ĉe la Universitata Zoologia Muzeo en Oslo, membro de la Akademio de Esperanto. Li parolis pri la temo "La Eŭropa Angilo Tute ne Frajas!". En 1922 la dana zoologo Johannes Schmidt malkovris, ke la angilo frajas en la Sargaso-marĉo kaj ke ĝiaj larvoj per la golf-fluo estas kondukataj al la bordoj de Eŭropo. Tie ili poste supreniras en la riverojn. Ankaŭ la amerika angilo frajas en la Sargaso-marĉo, sed ĝiaj larvoj per aliaj fluoj atingas la amerikajn bordojn. La angla zoologo D-ro D. W. Tucker montras, ke la amerika kaj eŭropa angiloj ne reprezentas du diversajn speciojn. La larvoj, kiuj iras orienten, atingas la bordojn eŭropajn, tiom malproksimaj, ke ili neniel povos reveni al sia "naskiĝloko". Ili ĉiuj mortas en eŭropaj marĉoj ne frajinte. Male la amerikaj angiloj, pro la malpli granda distanco, povas reveni al la Sargaso-marĉo por tie fraji. Ĉiuj angiloj, eŭropaj kaj amerikaj, estas idoj de amerikaj angiloj.

Prof. H. L. Elvin, M. A., direktoro de la Instituto de Edukado de la Londona Universitato, parolis pri la temo "La Angla Edukado, Kiel ĝi Estas Vidata de Eksterlandano". La preleganto, kiu estis dum 6 jaroj Direktoro de la Eduka Departemento de UNESKO, havis la okazon observi la diversajn edukajn sistemojn en la mondo. Li, do, prezentis la anglan edukajn sistemon en komparo kun la aliaj kaj emfazis kelkajn ĝiajn malavantaĝojn kaj kelkajn avantaĝojn. Li finis sian prelegon dirante, ke ĉiu eduka sistemo enhavas ion bonan kaj ke oni povas lerni el la spertoj de la aliaj, sed ke tamen ĉiam estas necese konsideri la specifajn karakterizojn de la lando rezulte de ĝiaj tradicioj kaj historio.


Prof. D-ro Ivo Lapenna, estinta profesoro de Internacia Juro en la Universitato de Zagreb, "Fellow" kaj honoraria preleganto pri Internacia Juro en "The London School of Economics and Political Science" de la Londona Universitato prelegis pri la "Internacijuraj Problemoj de Spacveturado". Li prezentis la jurajn problemojn, kiujn elvokas la moviĝado de artefaritaj satelitoj laŭ difinitaj orbitoj super la teritorioj de diversaj ŝtatoj. La preleganto rilatis negative al kelkaj tendencoj en la teorio, laŭ kiuj unuopaj ŝtatoj povus okupi en la estonteco ĉielajn korpojn kaj subigi ilin al sia suvereneco. La estonta jura reguligo de la kosma spaco devas baziĝi ne sur la interesoj de la unuopaj ŝtatoj, sed sur tiuj de la tuta homaro.

D-ro Juan Régulo Pérez, licenciato pri Klasika Filologio, Doktoro pri romanida lingvistiko, Profesoro de la Universitato de La Laguna, Docento de Esperanto en la sama Universitato, membro de

la Akademio de Esperanto, prelegis pri "Komercaj rilatoj inter Kanariaj Insuloj kaj Flandrujo". Dum la 16-a jarcento, diris la doktoro, la potenco kaj ekonomia hegemonio de Eŭropo translokiĝis de Oriento al Okcidento, kaj ĝuste en tiu periodo la urbo Antverpeno fariĝis la plej grava centro de Eŭropo, sed en tiu komercado regis la hispanaj kaj portugalaj komercistoj, ĉar ili posedis la ŝlosilojn de la novaj produktoj, kiuj eniris Eŭropon, i.a. la sukero. Sekvis detala klarigo pri la sukerfabrikado kaj komercado, kiu fine logis multajn flandrojn al la Insuloj de la Fortuno, ĉar baldaŭ ili fariĝis la "Suiker Eilanden" por la eŭropa popolo. — D-ro Régulo Pérez aludis la fakton, ke se la Kanarioj iniciatis en la mondo la koncepton "kolonio", la kanariaj kampplantejoj same iniciatis la grandan skuiĝon de Afriko, kiun ni konas sub la nomo Sklavkomerco. Sen sklavoj nek en Kanarioj nek poste en Ameriko estus eble starigi sukerindustrion. Do la moderna sklaveco havas kiel bazon la sukerproduktadon.

Prof. D-ro **Marcel Roost**, profesoro en la Brusela Universitato, advokato kaj membro de la Ŝtata Komisiono por la Markomerca Leĝaro de Kongo, prelegis pri la "Juraj Problemoj pri Atoma Energio". La uzado de atomenergio por pacaj celoj starigas tute novajn problemojn. La timataj katastrofoj estas amplekseĝaj. Tial estas necese, ke la vendo, aĉeto kaj uzo de splitigeblaj substancoj estu reguligitaj perleĝe. Li pritraktis diversajn aspektojn de la problemoj kaj plurajn eblajn jurajn solvojn.

S-ro **Frank Merrick**, FRCM, "Fellow" de la Reĝa Kolegio de Muziko kaj konata pianisto parolis pri



La geaktoroj, kiuj brile prezentis la komedion "Kurioza Okazaĵo" de Goldoni. De maldekstre dekstren: Mladen Serment (Sinjoro Filiberto), Eta Bartolazzi (Fraŭlino Costanza), Božena Žinko (Marianna), Slobodan Stojanović (Guascogna), Jana Ravšelj (Fraŭlino Giannina), Srdjan Flego (Sinjoro de la Coterie).

"Esperantaj kantoj kaj ilia komponado". En sia prelego li pritraktis la celon de tiu ĉi komponado, la elekton de poemoj kaj aliajn demandojn. Laŭ la preleganto, taŭgaj temoj estas la sentoj de amo, timo, ĝojo kaj simile, kiujn la muziko devas intensigi.

Lic. **Tibor Sekelj**, licenciato, diplomito pri juro, "Fellow" de la Reĝa Geografia Societo en Londono, regula membro de la Jugoslavia Etnologia Asocio, Prezidanto de la Internacia Geografia Asocio, faris prelegon pri "Jogo, Filozofio, Celo kaj Praktiko" (kun lumbildoj). La preleganto diris, ke la Okcidento havas sian specialan koncepton pri Jogo, sed ĝi estas vera filozofia sistemo, kiu klopodas montri la vojon al la beata ekzistado al ĉiuj. La vojo estas malfacila kaj plena de rezignoj. Raĝa-jogo atingas ĝin sur spirita vojo, kaj Hatajogo emfazas la korpajn pozojn. — Sekvis montrado de lumbildoj kaj klarigoj pri ili. La vivo de la jogano celas atingi ekvilibron kaj harmonion de funkciado de siaj organoj, poste harmonion inter la korpo, animo kaj spirito. — Al la demando, ĉu Jogo taŭgas por okcidentanoj, S-ro Sekelj respondis, ke ĝi taŭgas por multaj okcidentanoj, sed ne por tiuj, kiuj vivas en la okcidenta medio, kiu postulas de ili dinamikon, elastecon, rapidecon de korpo kaj de intelekto. La joga sistemo kontraŭe postulas kaj instruas statikajn korpon kaj spiriton.

Prof. **G. Waringhien**, agregaciulo pri lingvistiko, profesoro ĉe la Liceo "Lakanal" kaj ĉe la Pariza Brita Instituto, parolis pri "La Belga Literaturo Vidata el Francujo". En sia prelego Prof. Waringhien unue parolis pri la Flandroj kaj Valonoj kiel uzantoj de la franca lingvo kaj poste prezentis la tri grandajn verkistojn Ch. de Coster, E. Verhaeren kaj M. Maeterlinck, akcentante la apartajn karakterojn de iliaj verkoj. En la literaturo estas rimarkeblaj du ĉefaj tendencoj, la materialisma kaj la mistika. Fine, la preleganto parolis pri la originaleco de la belga arto.

Prof. D-ro **W. E. Collinson**, emerita profesoro en la Universitato de Liverpool, estinta docento pri lingvo-scienco, "Fellow" de University College en Londono prelegis pri "Toponimio aŭ studo de loknomoj". La moderna studo de loknomoj — diris la preleganto — direktiĝas laŭ sciencaj principoj anstataŭantaj la ofte senbazajn konjektojn de diletantoj. Ĝi nepre bezonas kronologie ordigitan dokumentadon en arkivoj, kronikoj kaj literaturaj verkoj krom bona kono de arkeologio, geografio, folkloro kaj loka historio de la specifa regiono. Tiuj materialoj devas esti traktataj laŭ la plej rigoraj metodoj de la lingvoscienco. Aliflanke la toponimio faras utilan kontribuon kaj al la historio kaj al la lingvoscienco. La Belgoj jam faris bonan laboron sur tiu ĉi kampo.

La prelegoj estis, ĝenerale, bone vizititaj. Kelkfoje ĉeestis pli ol 700 kongresanoj.

LA TEATRA VESPERO

La oficiala teatraĵo de la Kongreso ĉi jare estis **Kurioza Okazaĵo** de Goldoni, prezentita de la Internacia Arta Teatro sub gvidado de Srdjan Flego. La trupo, jam konata de la lastjaraj kongresoj, konsistas preskaŭ tute el profesiaj geaktoroj, inter kiuj kelkaj tre elstaraj, kiel la fama, plurfoje premiita aktoro — ankaŭ filmaktoro — Mladen Šerment kaj Eta Bartolazzi, konata aktorino de la urba teatro de Zagreb, ambaŭ el Jugoslavio.

Pri la teatraĵo Marjorie Boulton skribas jenon:

Jam dum pluraj jaroj la Internacia Teatro, malgranda aro de seriozaj esperantistaj geaktoroj, faris tre ŝatindan laboron kaj multe altigis la nivelon de la Esperanta teatro. Kaj serioza teatra laboro estas laboro preskaŭ turmente streĉa, laboro pli laciga kaj nervsuferiga ol iu ajn, kiu ne spertis ĝin, povus imagi. Ni aldonu al la ordinara malfacileco de teatra laboro la malfacilecon de laboro sur ne longe konata scenejo, en halo, kies akustiko ne povas esti bone provita; post laciga vojaĝo..... kaj kian adekvatan dankesprimon la kongresanoj povos trovi.

La nova prezentado, laŭ la glata traduko de "Mevo", estis ege kontentiga. La trupo elektis bonegan komedion kun lerte plektita intrigo, amuzaj situacioj kaj klimaksiĝanta akumuligo de komikaj vortaj miskomprenoj; la granda aktora talento fortigis ĉiumomente la efikon de la sprita teksto. Nia fama Srdjan Flego denove reĝisoris kompetente pri ĉiuj detaloj. Ekzemple: mi neniam estus kredinta, ke oni povas tiel multe substreki la absurdecon de situacio, nur per la flirtado de ventumilo kaj per la polurado de okulvitroj; kaj kiu estus kredinta, ke la fuŝumado de eta melodio povus tiel perfekte esprimi la ironion de la vivo?

Ĉiuj geaktoroj parolis tre klare; la prononcado estis modela kaj kun la profesieco de la aktorado, kiu montriĝis aparte en la silenta ludado, la tuto fariĝis seninterrompa teatra ĝuo por la aŭdantaro.

Mladen Šerment ne nur prezentis la plej malfacilan rolon, tiun de Sinjoro Filiberto, kun vere majstra talento — li preskaŭ kapablu ludi la rolon sen la vortoj, nur per siaj esprimoplenaj gestoj, grimacoj kaj okulaj gimnastikoj — sed ankaŭ respondecis pri la belaj, aŭtentikecaj kostumoj. Ravis nin ne nur la tre bona ludado de Jana Ravŝelj kiel Fraŭlino Giannina kaj de Eta Bartolazzi kiel Fraŭlino Costanza, sed ankaŭ ilia miriga virina beleco; longe floru tiu rozo kaj tiu lilio! En la relative mallongajn rolojn de Sinjoro Riccardo kaj de Guascogna — Ivo Fici kaj Slobodan Stojanoviĉ metis ĉion eblan, kio povus ridigi kaj ĝojigi: kaj la vervo de Božena Žinko kiel la ĉambristino, Marianna, efikis kiel ia bela aprila ŝtormeto sur la scenejo. Kiel Srdjan Flego povis ne nur reĝisori, sed ankaŭ ludi la sufiĉe pezan



La gajnintoj de la Oratora Konkurso ricevis premiojn, gratulojn kaj varman aplaŭdon.

rolon de Sinjoro de la Coterie, mi ne pretendas scii — eble ni devas kontentiĝi per mia jam delonge akirita scio, ke esperantista entuziasmo ofte povas fari miraklojn. — Entute bonega vespero kaj valorega ero en la kulturaj manifestacioj de la Kongreso. Post la prezentado sub entuziasmaj aplaŭdoj la Prezidanto de L.K.K. transdonis florojn al la aktorinoj.

DUA TEATRAĴO

En la kongresa vendredo posttagmeze la Internacia Arta Teatro donis ekster la oficiala programo ripetan prezentadon de la **Friponaĵoj de Skapeno** de Molière, kiun ĝi prezentis antaŭ unu jaro en Varsovio, denove sub reĝio de Srdjan Flego. Ni recenzis ĝin en la oktobra numero de "Esperanto" 1959. Ankaŭ la dua prezentado, kiu rekonfirmis la kvalitojn de la komedio kaj de la aktoroj, rikoltis grandan sukceson, kvankam la salono Benelukso de la kongresejo havis nur limigitajn teknikajn eblecojn.

BELARTA KONKURSO

La kongresa libro informis pri la okazigo de la Belarta Konkurso kun ĉiuj necesaj indikoj pri la salono kaj horo, sed sur la kongresa tabulo "Oficialaj informoj" aperis sciigo "Belarta Konkurso ne okazos". Sen komentario. Tamen iom pli informitaj povis supozi, ke la malfrua limdato disponigita al la konkursantoj verŝajne kaŭzis la foreston de la Belarta Konkurso en nia 45-a. La juĝkomisio ne sukcesis prijuĝi ĉiujn konkursaĵojn, ricevitaĵoj nur kelkajn tagojn antaŭ la Kongreso. Sed ĝis la Solena Fermo de la Kongreso tamen la juĝlaboro progresis tiomgrade, ke S-ro Holmes



La kongresanaro de la 45-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta de la

povis proklami la gajnintojn en la poezia branĉo, originala kaj tradukita.

La premiojn ricevis por :

Originala poezio :

- 1-a premio : Jiří Kořínek, Ĉeĥoslovakujo
- 2-a — : Ludoviko Isák, Ĉeĥoslovakujo
- 3-a — : Sándor Császár, Hungarujo

Tradukita poezio :

- 1-a premio : Albert Samyn, Belgujo
- 2-a — : — — —
- 3-a — : Sinĝe Miyamoto, Japanujo.

La titoloj de la premiitaj verkoj ne estis menciitaj. Detala raporto pri la Belarta Konkurso 1960 aperos, kiam la juĝkomisiono finos sian laboron.

Ĉar S-ro Samyn estis la sola inter la premiitoj, kiu persone ĉeestis la proklamon de la rezulto, li estis kore aplaŭdita de la multnombra ĉeestantaro.

ORATORA KONKURSO

Kvin gejunuloj sin prezentis al la prezidanto de la Oratora Konkurso Prof. Waringhien. Tri

el ili estas denaskaj esperantistoj : la fratoj Minnaja el Italujo kaj F-ino Eliza Weide el Germanujo. Kvankam nur kvin, kompare kun la pasintaj jaroj la nombro kvin signifas progreson, ĉar ĝis nun kutime nur tri aperis ĉe la oratora pupitro. Ankaŭ elekto de la temo ĉi jare estis ebla: la gejunuloj povis elekti la preferatan inter kvin proponitaj. La tasko de la juĝkomisiono (Prof. Waringhien, S-ino E. Lapenna kaj S-ro G. Becker) ne estis facila. Ĉiuj kvin junaj oratoroj sin preparis por la konkurso kaj montris seriozecon kaj maturcon en la klopodoj. Tamen, ne ĉiuj povis montri la samajn kvaliton kaj talenton.

La unua premio estis aljuĝita al **KARLO MINNAJA** el Italujo por la temo "Internaciismo, Naciismo kaj Patriotismo".

La duan premion ricevis

JOHN WELLS el Britujo por la sama temo. La tria premio estis aljuĝita al

NICOLA MINNAJA el Italujo por la temo: Sporto — Ĉu rimedo de internacia amikiĝo?"

La du konsolajn premiojn ricevis :

HUMPHREY TONKIN el Anglujo, (interese estis,



ĵulio ĝis la 6-a de aŭgusto 1960 en Bruselo, sur la ŝtuparo de la Kongresejo

ke S-ro Tonkin parolis pri "Virinaj Rajtoj") kaj

ELIZA WEIDE el Germanujo (ŝi parolis pri la temo: "Aspiroj de la junularo en mia lando").

La kvina temo, ne elektita de unu el la oratoroj, estis: "La internacia jaro de la rifuĝintoj".

La publiko aplaudis la proklamon de la rezulto kaj la ricevinto de la unua premio, krom la diplomo kaj la mon-premio, dum unu jaro posedas la arĝentan pokalon "PREMIO IVO LAPENNA" — personan donacon de la ĝenerala sekretario — sur kiu, kiel la unua, estos engravurita la nomo Karlo Minnaja.

ARĜENTA SPRONO

Ĉar la Belarta Konkurso ne okazis, la transdono de la Arĝenta Sprono estis farita tuj antaŭ la Oratora Konkurso. Inter la kandidatoj proponitaj de Internacia Verkista Asocio la Eldonejo KOKO por la jaro 1960 elektis la konatan esplor-

vojaĝanton kaj verkiston Tibor Sekelj, kion S-ino Kirsten Zacho en la nomo de la eldonejo motivigis antaŭ la publiko. Fine ŝi transdonis al la "Aŭtoro de la Jaro" la diplomon kaj la insignon, la Arĝentan Spronon.

MUZIKA VESPERO

En la Palaco de Belaj Artoj kolektiĝis vendrede vespere pli ol 1000 kongresanoj por ĝui la diversspecajn muzikaĵojn kaj kantojn. La kantprezentado okazis kaj ĥore kaj de unuopuloj — ĉiam Esperantlingve. Specialan priparolon meritas Alice van Walleghe, belga kantistino ĉe la radio kaj televido, akompanata ĉe la piano de sia edzo, la belga pianisto Peter Desmet.

FILMOJ

Dum la Kongreso okazis tuta aro da filmprezentadoj, grandparte kun kultura kaj instrua enhavo pri belgaj temoj, ĉiuj en Esperanto parolataj. Granda nombro da kongresanoj uzis la okazon rigardi ilin.

FAKAJ KAJ NENEŬTRALAJ ORGANIZAĴOJ

En la kongreslibro troviĝis entute 116 programeroj, inter kiuj granda nombro da fakkunvenoj. Ne estas eble ĉi tie detale raportoj pri ĉiuj, sed laŭ la informoj de la Kongresa Gazetara Servo ni mencias la jenajn:

INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA havis jarkunvenon lunde, kaj ĝin prezidis Prof. W. E. Collinson, kiu invitis la ĉeestantojn ekstari je la memoro de la mortinta estrarano Prof. H. Sirk. Ĉar la sekretario/kasisto ne ĉeestis, la vicprezidanto S-ro Støp-Bowitz legis la programon, kiu same kiel la raportoj estis aprobita. Sekvis diskuto. — Vendrede okazis la publika kunveno, denove sub prezido de Prof. W. E. Collinson. Post voĉlego de letero de D-ro Makkink, kiu ne povis ĉeesti, estis diskuto pri la proponoj klarigitaj en la letero. La ĉeestantaro donis aliajn proponojn, interalie tiun pri transformado de la organizaĵo kaj la revuo. La plej tikla afero estas trovi novan redaktoron por Scienca Revuo.

Je la konkludo oni aprobis jenajn punktojn: 1. Enketo pri la nombro da esperantistaj sciencistoj; 2. Enketo pri japanaj sciencaj verkistoj esperantistaj; 3. Enketo pri publikaĵoj en Esperanto; 4. Ekago por Esperanto en la akademioj ĉiulandaj; 5. Propagando por Esperanto en neesperantistaj kongresoj sciencaj; 6. Priparolado pri studsemajno por reorganizado.

INTERNACIA ASOCIO DE JURISTOJ-ESPERANTISTOJ havis publikan kunvenon lunde. La diskuttemo estis "La pozicio de advokato en diversaj landoj". Post la bonveniga parolado de Prof. D-ro Lapenna pri la Celoj de la Publikaj Diskutaj Kunvenoj de J.A.J.E., Prof. D-ro Roost transdonis salutojn de la estro de la advokatoj en Antverpeno. Post la enkonduka raporto de Prof. D-ro Lapenna okazis raportoj pri la pozicio de advokato en la landoj Norvegujo, Danlando, Okcidenta Germanujo, Francujo, Belgujo, Britujo, Irlando kaj Bulgarujo. Fine Prof. D-ro Lapenna donis koncizan komparon inter la jura situacio rilate la temon en Soveta Unio kaj Jugoslavio.

INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ okazigis kunsidon lunde sub prezido de F-ino J. Dedieu por pridiskuti ĝeneralan gvidadon de la Ligo. La jarraporto 1959/60 estis aprobita. Rilate al kunlaboro kun U.E.A. oni prenis pozitivan sintenadon, sed oni atentigis, ke ILEI estas sendependa esperantista organizo. Estis decidite havi 3 kunvenojn dum la kongreso en Harrogate en 1961 pri "heredo" de certa monsumo de la iama Tutmonda Asocio de Geinstruistoj.

En sia 2-a kunsido ILEI pridiskutis la temon "Edukado kaj edukatoj. Ĉu la lernejoj ĝuas la nuntempan vivon laŭ via eduka sistemo, aŭ ĉu ĝi

estas nur sperto necesa?" S-ino Kennedy enkondukis diskutadon starigante la demandon, kiel interesigi la gelernantojn en la lecionoj? Ŝi substrekiis, ke estus bone enkonduki pli modernan instrusistemon. F-ino Dedieu raportis pri enketo en Francujo laŭ kiu montriĝas, ke la lernantoj deziras pli modernan instrumanieron kaj pli da libereco. Post pridiskuto de la temo sekvis filmo.

INTERNACIA ASOCIO DE POPOLUNIVERSITATOJ okazigis kunvenon sub prezido de S-ro Petit. Oni traktis la 3-an Konferencon de PU okazonta en Strasburgo de la 8-a ĝis la 12-a de septembro, kiam la Asocio fariĝos monda. La prezidanto klare informis pri la laboro farita de I.A.P. kaj pri ĝia granda progreso. Sekvis diskuto, en kiu partoprenis delegitoj el Italujo, Germanujo, Pollando, Svedujo kaj Jugoslavio. La prezidanto instigis la ĉeestantojn influi ĉe siaj popoluniversitatoj, ke ili delegu sian reprezentanton, kiu ankaŭ scias paroli Esperanton. Li informis, ke la konferenco okazos en la Palaco de la Universitato en Strasburgo, kie estonte estos la centro de la Asocio. La urbo kaj la franca ŝtato financos la Konferencon, al kiu estos allasitaj ankaŭ 80 infanoj. La invitiloj estas senditaj al multaj popoluniversitatoj, tiel ke oni atendas 200 reprezentantojn. — La kunveno voĉdonis rezolucion.

INTERNACIA SOCIETO DE ARKITEKTOJ KAJ KONSTRUISTOJ kunvenis sub prezido de S-ro K. Tyminski por pridiskuti la statuton de la Societo kaj la fakan vortaron. Oni decidis ne ŝanĝi la jam aprobitan statuton. S-ro Francisco Azorin el Meksiko elektiĝis kiel nova kasisto. Post longa diskutado oni proponis daŭrigi la laboron de la vortaro kun la celo eldoni fakan vortaron laŭ la metodo de la jam elĉerpita — verkita de S-ro Azorin.

STUDENTA TUTMONDA ESPERANTISTA LIGO (STELO) havis sian jarkunvenon tuj sekvoitan de estrarkunsido, kiun prezidis S-ro P. Ciliga. La Prezidanto resumis la principon de por-esperanta agado sur studenta kampo. Sekvis kelkaj raportoj, kaj fine okazis elektoj de la estraro: Prezidanto V. Sadler (Britujo), Vicprezidanto P. Ciliga (Francujo), Sekretario/Kasisto J. C. Wells (Britujo), ceteraj: W. Bruynesteyn (Nederlando), N. E. Kristoffersson (Svedujo), C. Minnaja (Italujo) kaj F-ino Simiĉ (Jugoslavio).

TUTMONDA ESPERANTISTA JURNALISTA ASOCIO (TEĴA) kunvenis sub prezido de D-ro Dino Fabris por pridiskuti la plifortigon de la organizo. La sekretario raportis pri la laboro plenumita dum la pasinta jaro, precipe pri la novaj

iniciatoj. La ĉeestantoj montris grandan interenson pri la bulteno "Internacia Ĵurnalisto" kaj pri la renkontiĝo en Baden en oktobro, kie TEĴA devos esti reprezentita. Fine kelkaj proponoj estis diskutitaj.

KUNVENON INTER ELDONISTOJ KAJ REDAKTOROJ DE ESPERANTO-GAZETOJ malfermis S-ro M. Jaumotte, Prezidanto de L.K.K., klarigante la kialon de tiu kunveno. Oni diskutis multajn praktikajn problemojn, kaj en la diskuto partoprenis reprezentantoj de multaj eldonejoj, kiel ekz. S-roj J. Régulo Pérez (Stafeto), A. Sekelj (Serbia Esperanta-Ligo), Ciliga (Franca Esperantisto), Th. Jung (Heroldo), M. Gjivoje (Jugoslavia Esperantisto, La Suda Stelo) k.a. Detala raporto estu farita kaj sendita al ĉiuj Esperanto-eldonejoj.

UNIVERSALA LIGO havis jarkunvenon, dum kiu raportis la sekretario, S-ro A. Cseh, pri la faritaj laboroj, precipe pri la eldono de la internacia mono, la stelo, en formo de moneroj. Aklande oni decidis sendi telegramon al Prof. D-ro Privat. La kunveno reelektis la du periode eksigantajn estraranojn: Prof. Edmond Privat kaj S-ron H. J. Hendriksen. La propono de la estraro pri altigo de la kotizo akceptiĝis unuanime tiel, ke en 1961 la jarkotizo estos 32 steloj (kun la gazeto "La Praktiko"). Dumviva membro kun "La Praktiko" pagos 700 stelojn — sen gazeto 100 stelojn. Fundamenta membro (sen gazeto) pagos 500 stelojn. — Post la kunveno S-ino Isbrucker faris paroladon pri "Aktualaj pacproponoj de Paul Shipman Andrews kaj de Kav. Anthony Brooke".

MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO kunvenis por pridiskuti la temon "Esperanto je la servo de internacia kaj socia paco". Oni parolis pri diversaj tendencoj en la porpaca movado kaj pri la rolo de MEM en la orientaj kaj okcidentaj landoj. Konklude, la tasko estas: kompreni la situacion en ambaŭ flankoj.

ESPERANTO ŜAK-LIGO INTERNACIA kunvenis sub prezido de S-ro Duthilleul. Prezentiĝis la rezultoj de la pasinta jaro, kaj oni pridiskutis la venontan laboron. Post voĉlegado de kelkaj leteroj sekvis raportoj. — Estis decidite sendi dankesprimon al la revuoj "Esperanto" kaj "Nuntempa Bulgario" pro la Ŝak-rubrikoj.

SKOLTA ESPERANTISTA LIGO okazigis sian kunvenon sub prezido de S-ro J. L. Van Gulck, kiu resumis la ĝisnunajn atingojn de la Ligo kaj emfazis, ke ĝis la lastaj jaroj la skoltaj instancoj ne tre favoris Esperanton, sed nun oni iom sukcesis enpenetri la internacian skoltan medion. Sekvis raporto kaj fine oni elektis komitaton por kunmeto de laborplano.

INICIATA KOMITATO DE INTERNACIA ELEKTRISTA ASOCIO. Sub prezido de Prof. Inĝ. Monĉilo Ŝaponjiĉ kolektiĝis la ĉeestantaj mem-

broj por kolekti samprofesiulojn kaj grupigi ilin en fakrondoj en la unuopaj landoj. Oni decidis provi dum la venonta kongreso organizi fondkunvenon de la Komitato de Internacia Elektrista Asocio.

LA LIBEREKONOMIA MOVADO okazigis kunvenon, dum kiu D-ro W. P. Roelofs faris prelegon "Uzuro kaj Paco" pritraktante la demandon, ĉu laŭ moralfilozofia vidpunkto la interezo estas akceptebla. Oni pridiskutis la libermonajn eksperimentojn kaj konkludis, ke ĉiu lando havas la eblecon sin elturni el la ekonomiaj krizoj laŭ la principoj de socia libereco kaj ekonomia justeco formulitaj de Silvio Gesell en la libro "La Natura Ekonomia Ordo" (traduko en Esperanto baldaŭ aperos).

INTERNACIO DE MILITREZISTANTOJ kunvenis sub la prezido de S-ro Alfred G. Tucker, kiu klarigis la originon kaj la nunan praktikon de la organizaĵo, kiu deziras kunligi precipe tiujn, kiuj subskribas la Deklaracion, ke ĉiu milito estas krimo kontraŭ la homaro. S-ro Harold Bing faris prelegon pri la temo "Bazaj principoj de pacifismo", en kiu li i.a. diris, ke la pacifismo komenciĝas per la persona rifuzo militserva kaj ke ĉiuj interrilatoj kun la kunuloj devas esti bazitaj sur amo kaj ne sur perforto. Efektive, la pacifismo sumiĝas en la Zamenhofa homaranismo.

INTERNACIA GEOGRAFA ASOCIO okazigis sian jarkunvenon sub prezido de Lic. Tibor Sekelj. Post la raportoj, kiuj akceptiĝis, okazis reelektado de la nuna komitato — kun alekto de kelkaj novaj membroj. Sekvis diskuto pri pliaktivigo de la Asocio. Oni decidis pli ofte eldoni la bultenon kaj denove organizi Geografian Semajnon.

INTERNACIA KORESPONDSEKTO. Sub prezido de S-ro Bruno Vogelmann I.K.S. pritraktis la problemojn de la funkciado, kaj la ĉeestantoj konsentis daŭrigi la laboron.

ROTARIANOJ kunvenis por raportoj pri korespondado kaj alia kunlaboro inter rotariaj kluboj. Oni decidis sendi rezolucion al la Centra Oficejo de la rotaria movado por peti akcepton de Esperanto kiel dua lingvo.

INTERRILATA CENTRO DE LA ESPERANTISTOJ-KAMPADISTOJ kunvenis sub prezido de S-ro Léon Courtinat por preparoli la propagandon de Esperanto inter la kampadistoj. Sekvis raporto kaj vigla diskuto pri la farenda laboro estonta por I.C.E.K.

REĜA BELGA LIGO ESPERANTISTA okazigis festkunvenon, kiun prezidis S-ro M. Jaumotte. La diskutemo estis honorigo de membroj, kiuj estas membroj dum 40 jaroj kaj de personoj, kiuj estas esperantistoj dum 25 jaroj. Al Karlareĝa Grupo estis transdonita la premio-Jennen (kun diplomo).

**INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPE-
RANTISTA** havis prelegon de S-ro H. de Roover
pri "Internacia Katolika Laborista Junular-
movado". La kernideo de la K.L.J., ĉirkaŭ kiu S-ro
L. J. Cardyn (Bruselo 1882) konstruis sian gravan
movadon estas, ke la plej necesaj apostoloj de la
laboristaro estu la laboristoj mem. Tiu movado
estas por la junaj laboristoj lernejo, servo kaj
reprezentanto. K.L.J. kaj la katolikaj esperantis-
toj povus utile kunlabori.

**KRISTANA ESPE-
RANTISTA LIGO INTERNA-
CIA** okazigis prelegon pri "Kristana toleremo",
en kiu S-ro E. Carlén, Svedujo, pritraktis la KELI-
kongresojn. En 1961 la kongreso verŝajne okazos
en Bristol, Britujo. Fine li substrekis, ke krista-
noj estu ĉiam toleremaj.

**LA ESPE-
RANTISTA SPIRITISTA SOCIETO.**
Okazis publika kunveno kun prelego de S-ro H.
W. Holmes pri "Esperanto kaj psika esploro". S-ro
Holmes substrekis, ke la bazo de la esploroj estas
pure scienca kaj ne religia. Li antaŭe faris 2500
eksperimentojn, kaj dum la kunveno disaŭdiĝis
sonbendo de seanco en Esperanto.

**KVAKERA ESPE-
RANTISTA SOCIETO** sub
prezido de S-ro Alfred G. Tucker havis adorkun-
venon kun partopreno de proksimume 20 perso-
noj. Estis mallonge skizita la origino kaj la prin-
cipoj de la Kvakeroj, kaj oni donis kelkajn infor-
mojn pri la spertoj en la kvakera movado.

**BUDHANA LIGO ESPE-
RANTISTA** dum sia
kunveno pridiskutis problemojn de Budhismo en
la ĉiutaga vivo kaj organizajn aferojn de la Ligo.
Sub prezido de Rev. Kaĉano 38 kongresanoj
el 7 landoj partoprenis kaj aŭskultis voĉlegadon
de la pasintjara protokolo kaj de la salutoj rice-
vitaj.

**BAHAA ESPE-
RANTO-KOMITATO** kunvenis
sub prezido de Theo Beets, Den Haag. S-ro W. von
der Ley faris paroladon pri "Unueco de la homaro".
kaj 34 personoj ĉeestis. Portreto de Abdul-Baha
kaj diversaj presaĵoj estis en ekspozicio.

Krome, laŭ la Kongresa Libro okazis kunvenoj de
la Tutmonda Esp. Kuracista Asocio, Int. Komitato
de Esp. Virinoj, Societo de Gefratoj, Fervojistoj,
Veteranoj kaj Framasonoj.

ALIAJ ARANĜOJ KAJ GRAVAĴOJ

AKADEMIO DE ESPE- RANTO

Okazis du kunvenoj, el kiuj la dua estis publika,
kaj ĝin ĉeestis ĉirkaŭ 700 personoj. La diskutte-
mo estis la problemo ata — ita. La diskuton en-
kondukis la Prezidanto de la Akademio Inĝ. Is-
brucker, kaj en ĝi partoprenis: Prof. D-ro Col-
linson, Prof. D-ro I. Lapenna, Prof. Waringhien,
S-ro Støp-Bowitz, Lektoro Pragano kaj S-ro T.
Jung. En la diskuto Prof. Waringhien kaj Prof.
Lapenna eksplikis la pure Zamenhofan uzon de
la participoj kaj montris per ekzemploj el la prak-
tika vivo la malklaraĵojn, kiujn kaŭzas ĉiu alia
uzado, dum ankaŭ la aliaj parolantoj klarigis sian
starpunkton. Ni esperas en unu el la sekvontaj
numeroj de la revuo aperigi pli detalan raporton
pri tiu interesa diskuto.

INTERNACIA EKZAMENO

Unuan fojon dum tiu ĉi kongreso okazis la inter-
nacia ekzameno por akiri la diplomon pri plej
supera instrukapableco. La ekzamenantoj estis
Doc. S. Pragano (gramatiko), Inĝ. J. R. G. Isbrucker
(historio) kaj D-ro J. Régulo Pérez (literaturo),


dum funkciis kiel sekretario S-ro Norman R.
Smith. La ekzameno konsistis el skriba kaj buŝa
partoj kaj daŭris la tutan ĵaŭdon kaj parton de
la vendredo. Pli detala raporto kun la rezultoj
estos publikigita en unu el la venontaj numeroj
de la revuo.

BELGA VESPERO

Dimanĉon vespere, post la prelegoj de I.S.U.,
okazis en la granda salono Alberto I tre sukcesa
Belga Vespere. Oni donis sintezan prezenton de
la ekonomiaj, geografiaj kaj historiaj karakterizoj
de Belgujo. Multaj uzis la okazon por fari liberajn
demandojn kaj S-ro Jaumotte, la ĉefa parolanto
en la programo, funkciis kiel vivanta enciklopedio,
tiel ke la kongresanoj eksciis plej diversajn deta-
lojn pri ĉi tiu ĉarma lando.

DISERVOJ

LA KATOLIKA DISERVO okazis en la preĝejo
St. Gudulo, kaj ĝin ĉeestis proksimume 500 per-
sonoj. Pastro E. Rohen predikis pri "La Univer-
sala Tasko de la Eklezio".



La bankedo de la 45-a

PROTESTANTA DISERVO. En templo de la Muzea strato ĝi okazis kaj ĉeestis proksimume 230 personoj. Oficis Pastoro T. Ilamari Haapalainen el Finnlando pri "Pentu kaj kredu al la evangelio".

LA INTERKONA VESPERO

Ĉi tiu tradicia programero okazis la 30-an de julio en la salonoj de la MADELEINE, kiuj estis plenplenaj de la jam alvenintaj kongresanoj (proks. 1500) vigle babilantaj en la momentoj kiam ne malhelpis tion al ili la tondraj bruegoj de la laŭtparoliloj. Nur iom antaŭ noktomezo la ĉeestantoj komencis foriri.

LA BANKEDO

Mardon la 2-an de aŭgusto je la 19-a horo kolektiĝis proksimume 300 personoj belvestitaj. Evidente, tiu ĉi nova ero, nur de kelkaj jaroj enkondukita en la kongresan programon, plaĉas al tre multaj kongresanoj. La bankedo daŭris ĝis iom post la 21-a, kiam la ceteraj kongresanoj alvenis por partopreni en la

KONGRESA BALO

Instigate de tre taŭga kaj bonhumora danc-orkestro la Kongreso nelacigeble dancis ĝis la 2-a matene. Multe kontribuis al la agordo, ke ĉifoje la balo okazis en unu grandega salono anstataŭ en pluraj malpli grandaj, kiel pro la lokaj cirkonstancoj estis en kelkaj antaŭaj kongresoj. Tamen la dancplanko donis sufiĉe da loko al ĉiuj dancemuloj. Estis plezuro vidi grandan nombron da ĝejunuloj, kiuj ne nur bonege dancis, sed ankaŭ bonege parolis Esperanton. La plifortikiĝo de TEJO manifestiĝas ĉiam pli evidente ankaŭ dum la Kongresaj Baloj!

AKCEPTO

La Kooperativo por Vinoj kaj Ŝaŭmvinoj estis invitinta la tutan kongresanaron al sia fabriko en

Hoeilaert, kaj tiu ekskurso estis vera sukceso. Gvidate de la estro de la fabriko la vizitantoj ricevis multajn informojn pri la preparo de la vinoj, kiujn ili poste gustumis.

JUNULARA VESPERO

La Junulara Vespero okazis en la kafejo "Lion d'Or", kaj ĝin partoprenis 200 ĝejunuloj. Jam je la 20-a horo komenciĝis la dancado, en kiu partoprenis junaj esperantistoj el 40 diversaj landoj. Nur je la unua horo post noktomezo oni finis la balon.

VIZITOJ AL AMBASADOJ

Kaj la franca kaj la dana ambasadoroj invitis siajn samlandanojn al vizito, kiu daŭris unu kaj duonan horojn. Atendis la gastojn eleganta regalo. La danaj ambasadoro kaj ataŝeo montris sin tre favoraj al Esperanto.

EKSKURSOJ

Laŭtradicie la kongresa jaŭdo estis dediĉita al tuttagaj ekskursoj. Certe al multaj kongresanoj la elekto estis malfacila, ĉar ambaŭ ekskursoj vizitis famajn turismajn regionojn de Belgujo.

Al la **ARDENOJ** ekskursis proksimume 160 kongresanoj, kaj unue ili estis en **Waterloo**, kie oni vizitis la diversajn vidindaĵojn. En la tre bela urbodomo de **Charleroi** skabeno S-ro Legrand bonvenigis la karavanon akcentante la bonajn interrilatojn, kiuj ekzistas inter la urbestro kaj la gvidantoj de la loka Esperantogrupo. Trinkinte la honorvinon la grupo veturis al **Namuro**. La veturado — precipe tra la romantika kaj mirinde bela valo de Mozo — estis tre ĝuinda. Nur malfrue la granda karavano revenis al Bruselo.

Al **BRUĜO** la ekskursanoj jam matene forveturis, kaj dividitaj en tri grupoj ili havis la eblecon trarigardi la plej vidindajn konstruaĵojn en la urbo. Multaj faris boatan ekskurson sur la kanaloj, kaj dudek eminentuloj estis akceptitaj de la urbestro en la granda Urbodomo. Tagmeze en la **Haloj de la Belfrido** okazis flandra bankedo kun folkloraj muzikaĵoj, vestoj kaj flagoj. La muzikistoj kaj servistoj estis vestitaj en kostumoj el la tempo de Breughel (16-a jarcento). Ĉar dumtempe estis en Bruĝo ekspozicio pri verkoj de la famaj flandraj primitivaj pentristoj de la 15-a jarcento, la ekskursanoj eluzis la okazon ĝin viziti — La karavano daŭrigis al **Ostende**, kie multaj sin banis en la Norda Maro.

Krom dum la ekskursita tago, ankaŭ dum preskaŭ ĉiuj aliaj tagoj de la semajno okazis malpli longaj ekskursoj: al Gent, al Antverpeno, tra Bruselo, al muzeoj kaj al pluraj entreprenoj. Oni eĉ povas demandi sin, ĉu pro tio la kongreso ne ricevis tro turisman karakteron, malfavore al la kongresaj

laboroj. Se okazas ekskursoj samtempe kun Ĝeneralaj Kunvenoj aŭ Sekcioj, tio jam certe influas la partoprenadon en la kunsidoj.

AKTIVA KONGRESA GAZETARA SERVO

Same kiel en la pasintaj jaroj, la Kongresa Gazetara Servo laboris en du branĉoj: la nacilingva kaj la esperantista.

La nacilingva branĉo dissendadis dum la tuta antaŭkongresa jaro komunikojn pri la Kongreso en franca kaj flandra lingvoj al la belga gazetaro kaj al la informagentejoj. Tiuj komunikoj estis konstante akceptataj kaj aperigataj ofte sub trafikaj titoloj. La granda semajna revuo "Femmes d'Aujourd'hui" (Virinoj de hodiaŭ) kun unu miliono kaj duono da eldonekzempleroj, aperigis dupaĝan artikolon kun multaj bildoj. La sama branĉo de la Gazetara Servo organizis, unu tagon antaŭ la komenciĝo de la Kongreso, bone vizititan ĵurnalistan konferencon kun la Estraro de U.E.A. dum kiu, post enkonduko de la Prezidanto de L.K.K. la Ĝenerala Sekretario, Prof. Lapenna donis informojn pri la plej gravaj laboroj de la Kongreso, precipe de la Sekcioj. Krome, ĝi eldonis dum la kongresa semajno kelkajn bultenojn en franca kaj flandra kaj ĉiutage ĝi kontaktis la ĉefajn gazetojn kaj la naciajn radiojn. Granda parto de la spaco en la belga gazetaro estis dediĉita al la eventoj en Kongo kaj tial, bedaŭrinde, la informoj pri la Kongreso estis gastigataj sen speciala reliefo. La belga branĉo de la Gazetara Servo estis gvidata de S-ro R. Jaumotte, profesia ĵurnalisto, membro de L.K.K.

La alia branĉo de la Kongresa Gazetara Servo havis la taskon havigi al la esperantistaj gazetaro, ĵurnalistoj kaj radio-stacioj kompletan raportaron, kiu estu samtempe detala protokolaro pri la kongresaj programoj. Tiu ĉi fako funkciis nur dum la kongresa semajno kaj ĝi estis gvidata de S-ro M. Ĝivoje, Jugoslavio, redaktoro de la "Suda Stelo", kiu jam en pasintaj jaroj estris gazetarajn servojn de naciaj kaj universalaj Esperanto-Kongresoj. Li speciale por tio venis al la Kongreso kaj dum la tuta semajno aŭ izole laboris en la aparta ĉambro de la K.G.S. aŭ mem faris la raportojn en pluraj kunsidoj. Estis eldonitaj entute 8 bultenoj en Esperanto kun sume la rekorda cifero de 61 paĝoj: ĉi bulteno eldoniĝis en ĉ. 200 ekzempleroj: la multobligitaj paĝoj superis kune la nombron de 12.000.

Kunlaboris por ambaŭ fakoj de la Gazetara Servo S-ro L. De Marré, L.K.K.-ano; la oficeja laboro estis grandparte plenumita de S-ino M. De Marré. La kolektitaj raportoj pri la diversaj okazintaĵoj, sur kiuj baziĝis la tuta laboro de la Gazetara Servo, estis verkitaj de 45 gekongresanoj. Radio Varsovio kaj Radio Zagreb speciale sendis respektive unu redaktoron. Kompletan surbendigon por la Magnetofona Servo de U.E.A. kaj por la

arkivoj de la Movado zorgis S-ro Montmirail de la Esperanto-societo de Antverpeno.

LA KONGRESA LIBRO

La Kongresa Libro, 141-paĝa, havis la formaton kaj amplekson de tiu de Marseille kaj estis pro tio pli facile manipulebla ol la lastjara. Ĝi enhavis la kutimajn informojn pri lando, urbo, kongresa ordo ktp, kiel ankaŭ artikolojn pri la fama Granda Placo de Bruselo kaj pri Goldoni. Tre utilaj estis la paĝoj pri la laboro de la Kongresaj Sekcioj, sed pli utilaj ili estus, se la partoprenantoj ricevus la libron — kiel pli frue estis la kutimo — kelkajn semajnojn antaŭ la kongreso.

Kvar paĝoj donas tre bonan superrigardon pri la laboro de la Centro de Esploro kaj Dokumentado kaj oni povas nur esperi ke ĉiuj legantoj enkapigu la gravecon de tiu institucio. La programpaĝoj pri la Internacia Somera Universitato, tiel altnivela ĉijare, meritis apartan represon por utiligo en intelektulaj medioj, kiel okazis en antaŭaj jaroj. La kongresa programo mem, facile trovebla en la mezo sur blua papero, estis denove tre praktike aranĝita.

Ni ne trovis detalojn pri la Kongresa Gazetara Servo, ĝiaj branĉoj kaj respondeculoj, nek pri la Cseh-Seminario, dum preskaŭ tute mankas reklamoj, kiuj kutimas vivi la aspekton — kaj sendube ankaŭ la financojn.... Vane la kongresanoj serĉis ankaŭ la P.T.T.-tarifojn, sed ili povis ricevi ĉiujn informojn en la kongreseja poŝtoŭicejo. Reaperis, post la Dua Bulteno, la portretaro de L.K.K., tiel ke la kongresanoj jam facile povis rekoni ĉiujn funkciulojn.

El tipografia vidpunkto la libro bedaŭrinde ne estis sufiĉe prizorgita. Kvankam plurloke montriĝas ke la presejo posedas la ĝustajn matricojn, ofte sur unu paĝo kaj eĉ en unu linio troviĝas miksaĵo de ĝustaj kaj malĝustaj supersignoj. Ankaŭ ne estas solvita ankoraŭ la problemoj de la preseraroj, precipe en la adresaro, sed kiel tuto la libro bone respondas al la celo kaj okupos indan lokon en la longa vico de kongresaj libroj.



Apud la rendevua tabulo en la kongreseja halo.

LA KONGRESEJO

Ĝi estis la Palaco de la Kongresoj, moderna, belega konstruaĵo sur la deklivo de la "Monto de la Artoj" en la mezo de la urbo. Ĝi estas speciale konstruita por kongresoj, do havas ĉiajn avantaĝojn. Troviĝis en ĝi salonoj por ĉiuj ordinaraj kunsidoj, tiel ke nur por la Interkona Vespero, la Inaŭguro kaj la teatraĵo oni devis iri aliloken, sed en la tuja proksimeco.

La salonoj havis kompletan aparataron por samtempa tradukado. Observante la viglajn diskutojn, ekz. en la Komitatkunsidoj, kiam la parolo saltas de franco al norvego, de brito al finno, de jugoslavo al belgo, oni povas nur ĉagreniĝi pro la giganta povreco de tiu kapitalraba tradukmizero. Kutimas tie kunveni i.a. la Komitato de Ministroj de la Eŭropa Konsilantaro. Estus dezirinde, ke tiuj mondaj gvidantoj ricevu raporton pri iuj kunsidoj okazintaj en la Internacia Lingvo.

NOVA HONORA MEMBRO



S-ro David Kennedy, kiun la Komitato nomis Honora Membro de U.E.A.

S-ro David Kennedy, Britujo, fariĝis esperantisto en la jaro 1909 kaj ekde tiam restis daŭre aktiva en la Esperanto-Movado.

Dum 20 jaroj li estis prezidanto de la Esperanto-Societo en Glasgovo, kaj dum diversaj periodoj li estis prezidanto de la Skota Esperanto-Federacio. Multjara komitatano de BEA kaj de UEA. S-ro Kennedy estis, kiel konate, dum pluraj jaroj Estrarano de UEA kaj inter 1953 kaj 1956 vicprezidanto de la Asocio. Tuj post la fondiĝo de CED, la 9-an de januaro 1952, li fariĝis ĝia kunlaboranto kaj de tiam plenumis por CED plej sindone kaj akurate diversajn taskojn, tute speciale sur la kampo de la fako edukado kaj lernejoj.

Malgraŭ tiuj multnombraj funkcioj kaj taskoj, David Kennedy trovis tempon ankaŭ por instrui la lingvon. Dum 32 jaroj li instruis Esperanton al komencantoj kaj progresintoj por la Esperanto-Societo en Glasgovo. Li verkis multajn artikolojn por edukaj revuoj kaj ĵurnaloj en Skotlando kaj Anglujo pri la Internacia Lingvo kaj la Esperanto-Movado. Li faris tutan aron da prelegoj en diversaj skotaj urboj kaj urbetoj. S-ro Kennedy estis ankaŭ honorofica sekretario de la altgradaj Korespondaj Kursoj de BEA.

En la jaro 1926 S-ro Kennedy estis membro de la LKK, kiu aranĝis la U.K. en Edinburgo. Estante firme ligita al la tutmonda Esperanto-Movado, S-ro Kennedy vizitis kaj aktive partoprenis en la laboroj de ĉiuj uni-

versalaj kongresoj ekde Antverpeno en 1911 ĝis tiu de Bruselo en 1960, kun la sola escepto de la kongreso en Danzig. Entute li, do, vizitis 37 universalajn kongresojn, kaj tre verŝajne tiurilate li estas la persono kiu partoprenis plej multajn U.K. entute.

NOVA MEMBRO DE LA HONORA PATRONA KOMITATO

Kiel raportite aliloke, la Komitato nomis Prof. D-ro Björn Collinder, Svedujo, membro de la Honora Patrona Komitato, en kiu jam troviĝas Prof. D-ro W. E. Collinson, Prof. D-ro M. Fréchet, kaj Prof. D-ro Seiho Nishi. Ĉi sube sekvas kelkaj biografiaj notoj pri la nomito:

COLLINDER, Erik Alfred Torbjörn (BJÖRN) naskiĝis 22.VII.1894 en Sundsvall, Svedujo. Lia patro, gimnazia lernejdirektoro Erik Collinder, estis unu el la plej fruaj Esperanto-pioniroj.

Björn Collinder doktoriĝis en 1929 kaj fariĝis profesoro de finn-ugraj lingvoj en la universitato de Upsala en 1933. En la studjaro 1947-1948 li funkciis kiel invitita profesoro en Indiana University kaj en University of Minnesota.

Li faris plurjarajn esplorvojaĝojn prilingvajn en norda Svedlando, Finnlando, Hungarujo, Turkujo kaj en aliaj landoj.

Li verkis multajn sciencajn disertaciojn pri Skandinava, Hindoeŭropa, Finna, Laponia, Turka, Urala kaj ĝenerala lingvistiko kiel ankaŭ pri fonetiko kaj etnologio. En la angla lingvo li eldonis i.a. *The Lapps* (Princeton 1949), *Finno-Ugric vocabulary* (Upsala 1955), *Survey of the Uralic Languages* (Upsala 1957), *Comparative Grammar of the Uralic Languages* (Upsala 1960). En Esperanto: *La problemo de lingvo internacia* (Purmerend 1938). Tradukis sveden i.a. *Kalevala*, *Antigone* de Sofokles, *Kyklops* de Eŭripides, *La poezia Edda*, *Edda* de Snorre Sturlasson, *Beowulf* kaj *Romeo* kaj *Julia* kiel ankaŭ *Julius Caesar* de Shakespeare.

Pri la lingvistika kapablo de prof. Björn Collinder skribis en la aŭtuno 1959 alia konata sveda lingvisto, prof. H. S. Nyberg, i.a.: "Prof. Collinder estas sendube la sveda lingvisto, kies lingvoscio nuntempe estas la plej ampleksa. Krom sia speciala fako, la vasta finn-ugra lingvofamilio, li estras mirinde lerte la klasikajn kaj modernajn lingvojn de la hindoeŭropa lingvofamilio, kaj krome plurajn ekzotikajn lingvojn."

Jam en la jaro 1934 li komencis aktive subteni Esperanton. En tiu jaro li faris prelegon en la Somera Universitato de la U.K. en Stockholm pri "Vivo kaj moroj de la laponoj". De tiu tempo li estis talenta defendanto de la Internacia Lingvo en sciencaj rondoj.

U.E.A. gratulas al si, ke Prof. Collinder bonvolis akcepti la nomigon en la Honora Patrona Komitato.

Ni esperas ke en venonta numero ni povos publikigi foton de la nova Honora Patrono.

Noto de la Redakcio — Pro la granda amplekso de la kongresa raportaro tiu ĉi numero havas 24 paĝojn. Kompense, la oktobra numero havos 16 paĝojn.

BRILA INFANA KONGRESETO

Dum la kongresa semajno, sed tute aparte, en propra ejo iom ekster la urbo, okazis la Infana Kongreseto, en kiu partoprenis pluraj infanoj de kongresanoj.

La nombro de la infanoj aliĝintaj al la 5-a Internacia Infana Kongreseto — 87 el 9 landoj — superis ĉiujn antaŭajn esperojn: ĝi estas la duoblo ol en Varsovio. Ankaŭ la proporcia reprezentiĝo de la diversaj landoj estis sufiĉe varia, tiel ke en la kadro de la Kongreseto ne povis formiĝi forta unulingva insulo, en kiu la nacia lingvo tendencas superregi. El Finnlando venis 10 infanoj, 18 el Nederlando, 12 el Francujo, 14 el Belgujo (frankaj flandralingva partoj), 13 el Germanujo, 3 el Pollando, 3 el Jugoslavio: la aliaj venis el Britujo kaj Svisujo.

Tiel multnombra partopreno — spite de la severaj lingvaj postuloj — montras la rapidan evoluon de Esperanto en la lastaj jaroj, kaj kiel familia lingvo kaj kiel fako de lernejoj. Plurajn monatojn antaŭ la Kongreso la Loka Kongresa Komitato iniciatis la "Operacio" n "Adoptaj Gepatroj", kies celo estis pagi la vetur- kaj partoprenkostojn de meritplenaj infanoj el landoj malproksimaj aŭ kun devizaj malfacilaĵoj. Ĉirkaŭ 70 individuaj esperantistoj kaj Esperanto-Societoj pagis la petitan sumon de 400.— b.fr., tiel ke la Operacio kolektis pli ol 32.000.— b.fr. kaj povis inviti 10 infanojn el Finnlando, Pollando kaj Jugoslavio.

La Kongreseto disponis ĉijare pri tre taŭga ejo, nome pri la tuta impona Kastelo de Argenteuil, apud Waterloo, kiu dum la lerneja jaro gastigas agronomian lernejon. Tie, ĉirkaŭitaj de vastaj arbaroj kaj de idilia kamparo, la infanoj ĝuis pri tre vasta spaco, kiu formis la plej dezirindan etoson por la Kongreseto. La programo ne diferencis esence de tiu de la pasintaj jaroj: la etuloj, miksitaj laŭ landoj, estis dividitaj en 8 "familiojn", ĉiu el kiuj estis gvidata de plenkreskulo. La komuna vivo konsistis ĉefe el ludoj, ekskursoj, balo, promenadoj, manlaboretoj, dancostudoj, kantado, filmprezentadoj, pupteatro, k.s. Fundamento de la tuta Kongreseto estis la uzo de komuna lingvo, kiu ebligis al la partoprenantoj el tiom da landoj tujan interkompreniĝon, senperan kaj facilan interŝanĝon de pensoj kaj sentoj inter samaĝuloj kaj kiu estis fonto de multaj novaj amikiĝoj. Speciale sukcesa estis la fajrovespero, dum kiu tre bona pupteatro el Łódź (Pollando) prezentis amuzan spektaklon. Antaŭ 350 vizitantoj la infanoj montris sian talenton ludante skeĉojn kaj scenojn, deklamante poeziaĵojn, kantante ĥore kaj individue, gracie prezentante spektakleton, kiu rikoltis entuziasmajn aplaŭdojn flanke de ĉiu ĉeestanto. Dum la akcepto, la infanoj mem deĵoris kiel mastrumantoj de bazareto, vendantoj ĉe bufedo, trafikpoli-cistoj por la aŭtobusoj, k.s.



Momento el la Infana Kongreseto.

Kia estis la lingva nivelo? Generale, pli bona ol en pasintaj jaroj. Eĉ la infanoj, kiuj ne sufiĉe konis la lingvon, montris vere kortuŝan klopodon paroli en Esperanto. Grupo de lernantoj el Versailles, kiuj tro malmulte scipovis Esperanton, donis al ni novan sperton: por partopreni en Infana Kongreseto ne sufiĉas unujara lernado de Esperanto dum kurso, sed nepre necesas almenaŭ dujara periodo. Kompreneble, tio validas nur por lernejoj lernantoj kaj ne por tiuj, kiuj hejme praktikas la lingvon ĉiutage. Estas sugestinde al estontaj organizantoj pli neta divido inter infanoj kaj geknaboj: estas oportune eĉ fari du diversajn programojn, ĉar la preferoj de etulo de 6 jaroj ne estas la samaj kiel por knabino de 11 aŭ 12 jaroj. Krome, la gvidantoj devus pli multe apliki science modernajn pedagogiajn metodojn.

La sukceso de la 5-a Internacia Infana Kongreseto estas merito de la Loka Kongresa Komitato, kiu disponigis al ĝi grandan subvencion, kaj de la diversnaciaj gvidantoj: S-ino R. Jacobs, Belgujo, kiu zorgis la lokajn aranĝojn kaj gvidis unu el la "familiojn", S-ro Brandenburg, Germanujo, (kiu preparis la ĝeneralan organizadon), S-ro Moravec, Germanujo, S-ino Tavĉar, Jugoslavio, S-ino Strus, (Pollando) kaj aliaj helpantoj. S-ro Sadler, Britujo, vivis kun la infanoj la tutan semajnon kun la celo esplori la moralajn rezultojn de la Kongreseto rilate al infanedukado: lia eseo estos bazo de raporto prezentota al UNESKO.

LA 30-a INTERNACIA KONGRESO DE BLINDAJ ESPERANTISTOJ

En la kadro de la 45-a, sed kun sia aparta programo, okazis ankaŭ la blindula kongreso. Partoprenis 80 blinduloj el 13 landoj. Dum la inaŭguro la 31-an de julio estis elektita jena prezidantaro: Prez. S-ro Verlinde (Nederlando), vicprezidantoj S-ro Kreitz (Germanujo) kaj S-ro Gonin (Francujo) kaj sekretarioj S-ro Bouquin kaj S-ino Go-

nin (Francujo). La kongreson salutis reprezentantoj de ĉiuj landoj partoprenantaj.

En sia programo por la semajno la kongreso havis jenajn punktojn: "La instruado de Esperanto en la blindullernejoj", "Proponoj kaj rezolucio sendotaj al la tutmonda kongreso de blindulinstruistoj en Hannover, 1961", "La magnetofono kaj la blinduloj", "Propagando de Esperanto, ĉefe inter la junaj blinduloj" kaj "Kunveno kun la belga societo de Intelektaj Blinduloj". La ferma kunsido okazis vendrede kaj tie oni raportis pri la laboro farita dum la kongreso.

LA CSEH-SEMINARIO

En kunligo kun la 45-a okazis de merkredo matene la 27-a de julio ĝis sabato vespere la 30-a la jam tradicia seminario por Cseh-instruistoj, gvidata de S-ro Andreo Cseh mem, en lernejo en la urbocentro. Partoprenis 62 personoj el 19 landoj. Dum kvar plenaj tagoj, de la 9-a matene ĝis la 6-a vespere kun nur mallonga lunĉpaŭzo oni koncentrite laboris por akiri kiom eble plej kompletajn sciojn pri tiu ĉi unika instrumetodo.

La seminarioj, iam regule organizitaj en la fama Esperanto-Domo en la nederlanda urbo Arnhem kaj abrupte ĉesigitaj pro la katastrofo de la milito, ekde la U.K. en Haarlem reaperis kaj pli malpli regule estas aranĝataj nun en kunligo kun la Universalaj Kongresoj. Pro la granda manko de Esperanto-instruistoj post la milito, ilia bezono estis forte sentata kaj oni povas nur esperi ke ankoraŭ multajn jarojn Sinjoro Cseh persone povos gvidi la seminariojn por transdoni sian metodon al novaj generacioj de esperantistoj. Ĉar — neniam tro forte oni povas tion akcenti — la metodo estas perfekta, sed tre facile povas ĝin fuŝi mallertaj instruistoj, ne sufiĉe konantaj ĝiajn karakteron kaj spiriton kaj ne sufiĉe komprenantaj la gravecon de la plej etaj detaloj. Ja neniu pensu, ke per partopreno en unu sola seminario oni povas fariĝi kompetenta Cseh-instruisto, se oni neniam aŭdis kompletan kurson gvidatan de sperta, multjara Cseh-instruisto.

La inspiraj kaj spritaj lecionoj de Sinjoro Cseh estis por la aŭskultantoj eminenta instruado kaj neforgesebla sperto. Inter la partoprenantoj troviĝis ankaŭ Kav. Anthony Brooke, la estinta blanka Radjo de Serawak, kiu antaŭ nelonge konatiĝis kun la Internacia Lingvo, tuj komprenis ĝian signifon por la alproksimiĝo de la popoloj, al kiu celo li mem dediĉas sian tutan vivon, kaj ellernis la lingvon en mallonga tempo.

16-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

Pri la kongreso de T.E.J.O., okazinta en la antaŭkongresa semajno, Karlo Minnaja skribas la jenon:

Kiel ĉiujare, ankaŭ en 1960 la esperantista junularo havis sian grandan feston. Dank' al la senlaca laborado

de Eddy Borsboom, Helmi Veldhuyzen, Glauco Pompilio kaj la aliaj membroj de la LKK, sub la honora protektado de la honora ministro D-ro W. Drees, okazis de la 23a ĝis la 30a de julio la 16a Internacia Junulara Kongreso de T.E.J.O. La loko ĉifoje elektita montriĝis tre taŭga: ĝi konsistis el du domoj aparte konstruitaj por konferencoj, situantaj apud Overschie, antaŭurbo de Rotterdam. La allogaj ĝardenoj ĉirkaŭantaj la kongresejon, la ĉarmaj kanaloj kaj vojetoj ilin traŭrantaj donis al la gejunuloj plaĉan ripozejon kaj promenejon; la tre belaj kortobirdoj, kiuj sendanĝere paŝadis apud ni sur la herbejoj, faris la amikiĝon kun la naturo eĉ pli intima.

Jam sabaton matene la frue alvenintoj trovis simpatiajn deĵorantojn ĉe akceptejo en la stacidomo mem, kaj ni povis ĝui mallongan ekskurseton de la stacidomo ĝis la kongresejo. Tie nin atendis la kongresa dokumentaro, konsistanta el belaj flugfolioj kaj el tre eleganta kongresa libro kaj plaĉa praktika insigno. La kutima freŝa kaj amikeca atmosfero tuj kreiĝis, kaj en ĝi spiris ankaŭ pluraj komencantoj, kiuj ĉeestis tiam sian unuan kongreson kaj kiuj, post iom da timema apartiĝo, eniris la rondojn jam formitajn en la antaŭaj kongresoj.

La manĝoj okazis en la tera etaĝo de unu el la du domoj, kie tre grandaj vitrofenestroj donis la impreson manĝi sub la libera ĉielo. Tre ofte dum la tago surprize atingis nin kafo aŭ teo.

Se la amuza flanko de la kongreso komenciĝis tuj per la unuaj interknabaj kontaktoj, ankaŭ la kultura flanko jam sabaton vespere prezentis altnivelan programon: prof. P. Neergaard el Kopenhago parolis pri la lukto kontraŭ la malsato, kiu, precipe en la neprogresintaj landoj, estas ankoraŭ la ĉefa malsano de la homaro.

Dimanĉe matene ĉu la katolikoj ĉu la evangeliuloj havis apartan diservon kun predikoj en Esperanto. Posttagmeze okazis la oficiala inaŭguro: post malfermaj vortoj de la prezidanto de T.E.J.O., G. Becker, multaj nejunulaj organizaĵoj volis honori nian kongreson per saluto: inter aliaj UEA, KELI, IKUE, A.L.E.-F.L.E. Sekvis la salutoj de la nacioj reprezentataj, kaj la solenaĵon fermis la festparolado de la ĝenerala sekretario de T.E.J.O., N. Minnaja.

Lunde tri gejunuloj partoprenis en la Oratora Konkurso; la 1-an premion gajnis Eliza Weide (Germ.), parolante pri la temo "Ĉu la nuntempa junularo havas idealojn?"; per la sama temo estis 2-a John Wells (Brit.), kaj trie klasifikiĝis Humphrey Tonkin (Brit.), kiu parolis pri "Rapideco". Ĉiuj konkursaĵoj montriĝis je alta nivelo.

Posttagmeze la kongresanoj estis tre kore akceptataj de la urbestro de Rotterdam en la moderna urbodomo; pluraj ĵurnalistoj poste miksiĝis kun la gejunuloj kaj ĉerpis el tiu harmonio elementojn por tre favoraj artikoloj, kiuj abunde aperadis dum la kongresa semajno.

La kongresa balo kompreneble kolektis absolute ĉiujn gekongresanojn; ĝi okazis en tre bela halo, kaj ĝin plivig-



La prezidanto de L.K.K., Eddy Borsboom, dum la Inaŭguro de la T.E.J.O.-Kongreso.



La kongresanaro en la belega parko de la kongresejo "De Tempel".

ligis la prezentado de tre interesaj ludoj fare de fama nederlanda magiisto.

La laborkunsidoj de la Komitato estis tre oftaj; inter iliaj ĉefaj rezultoj estis la elekto de la Estraro, kiu nun konsistas el jenaj funkciuloj: Günther Becker, prezidanto; Richard Reuchlin, vic-prezidanto; Marek Pietrzak, vic-prezidanto; Nicola Minnaja, ĝenerala sekretario; Glauco Pompilio, kasisto; Ivo Osibov, redaktoro de la organo "La Juna Vivo"; Heinrich Reiter (sporto kaj junularaj renkontiĝoj); Nikolaj Nikolov (kontakto kun neesperantistaj junularaj organizaĵoj); Simeon Simeonov (informado).

La ekskursoj estis amuzaj kaj samtempe klerigaj; la haveno de Rotterdam montriĝis en sia grandioza laboro: miloj da grandaj ŝipoj kaj da gruoj ĉirkaŭis nian modestan ŝipeton. La urbo Rotterdam montris, kiel ĝi, tuj post la milito, komencis kuraci siajn terurajn vundojn. Speciale interesa estis la vizito al "Bouwcentrum", konstanta ekspozicio pri la rekonstruo de la urbo: la direktoro, ing. van Ettinger, kore salutis nin kaj organizis tre precizan gvidadon tra la ekspozicio, kiu en tiuj tagoj havis ankaŭ specialan fakon "Spaco por la Junularo".

La hortikultura ekspozicio "Floriade" malkaŝis al ni kelkajn el la sekretoj de la florkulturado: la tre afabla kaj lerta gvidado de s-ro Hans Bakker ĝuigis al ni en mallonga tempo la ĉefajn partojn de la ekspozicio, kiu lasis neforgeseblan memoron, precipe per siaj koloroj kaj floraranĝoj.

La prelegejo estis plena, kiam la ĝenerala sekretario de UEA, prof. I. Lapenna, parolis pri la rolo de la junularo en la nuntempa Esperanto-movado; post liaj incitaj vortoj okazis vigla debato inter la aŭskultintoj kaj la preleginto, kiu restis tre amike en la freŝa junulara atmosfero.

Al la nejunaj pioniroj estis dediĉita la merkreda vespero: la esperantistoj de la urbo Rotterdam estis honoraj gastoj, kaj simpatie interbabilis kun la kongresanoj.

La ĉiama amuzemo havis gravan punkton dum la sportaj konkursoj: se oni konsideras, ke, krom flugpilko, kuroj kaj tabloteniso, estis en la programo ankaŭ trovo kaj manĝo de kukoj kun fermitaj okuloj kaj kuro en sakoj, oni povas imagi, kiel plezuriga estis tiu posttagmezo sur herbejo kaj sub varma suno.

La oficiala agado de la kongresanoj ĝenerale finiĝis je la dua horo nokte, ĉar tiam nokta gardisto venis regule por sendi al la lito tiujn, kiuj fidele ĉiuvespere dancis senlace apud la radioaparato. Sed en la dormejo pludaŭris la diskutoj, la babiladoj, kaj ofte, laŭ ekzemplo de junaj knabetoj, ankaŭ la pli aĝaj fervore partoprenis en kusenbataloj. Multan amuzon kaŭzis la kudrado de pijamoj, la malaperigo de dentopasto kaj iu ne tute klara nokta fantomado.

Jam adiaŭan aeron oni spiris en la ŝipo rezervita al la kongresanoj por la tuttaga ekskurso al la "Delta-

laboroj", kiu komprenigis al la fremduloj la fervoron de la nederlandanoj en la ĉiama lukto kontraŭ la maro, por pene akiri alian fekundan grundon. La adiaŭa vespero konsistis el ludoj, kantoj, dancoj, kisoj... laŭ la rutino de la junularaj kongresoj.

La novaj kaj malnovaj geamikoj fiksis rendevuojn en Bruselo, en Cortina (kie okazos junulara renkontiĝo en septembro), en Britujo venontjare. Ĉiuj bedaŭris, ke la kongresoj daŭras nur unu semajnon, kaj ĉiuj enmense antaŭiris la tempon, revante pri nova frata kunestado.

ANTAŬKONGRESA RENKONTIĜO EN ARNHEM (Nederlando)

De la 27-a ĝis la 30-a de julio okazis la oficiala Antaŭkongreso en Arnhem. Pri ĝi skribas G. van Goethem:

La 27-an de julio pasinta, vespere je la oka, proksimume sesdek gesamideanoj el dektri landoj kunvenis por ĉeesti la malfermon de la tritaga interkontakto kiun Arnhema komitato estis organizinta i.a. por partoprenontoj je la Brusela Kongreso.

La prezidanto, s-ro Woessink, bonvenigis la ĉeestantaron kaj entuziasme pentris Arnhem ne nur kiel unu el la plej belaj turismaj centroj de Nederlando, sed ankaŭ kiel urbon, kiu ekde 1930 havis grandan signifon por la Esperanto-movado. Li memorigis la tiaman Esperantodomon, kiu jaron post jaro altiris aron da esperantistoj al Arnhem. Bedaŭrinde la milito haltigis tiun evoluon. La centro de la pacmovado fariĝis centro de la malamika rezisto kontraŭ la liberigantaj trupoj. Por ĉiam la batalo de Arnhem restos unu el la plej tragikaj epizodoj en la historio de la dua mondmilito. La enloĝantoj, la aspekto de la urbo trafita en ĝiaj plej ĉarmaj konstruaĵoj: jen Arnhem en printempo 1945a.

Sed la urbestro ne momenton hezitis rekonstrui la ruinojn kaj profiti de la okazo por plibeligi la urbcentron tiel ke la Arnhemanoj kun deca fiero nun povas diri ke la urbo kiel fenikso estas pli glorie releviganta el sia cindro. Denove ĝi altiras milojn da turistoj el ĉiaj partoj de la mondo. El tio naskiĝas bezono je internacia lingvo. Jam en 1956 oni priparolis en la urba konsilantaro la necescon ke Arnhem estu dulingva. Oni kunvokis kongreson de lingvistoj, en kiu ankaŭ kelkaj eminentaj esperantistoj partoprenis. En la jaro 1959a oni faris eksperimenton pri instruado de fremdaj lingvoj al infanoj. Inter tiuj lingvoj estis ankaŭ Esperanto.

Kvankam pro diversaj cirkonstancoj la eksperimento ne estis plene sukcesa, ĝi tamen havis grandan signifon por nia movado, deklaris s-ro Korff, kiu nome de la Centra Komitato poste salutis la kunvenintojn.

Post mallonga traktado de la prezidanto pri la geografio de Nederlando kaj precipe pri la provinco Gelderland, kies ĉefurbo estas Arnhem, du filmoj pri Arnhem kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj klarigis liajn parolojn.

Poste la ĉeestantoj havis la okazon pli intime interkonatiĝi. Jaŭdon la 28-an la partoprenantoj kune faris ekskurson tra la belaj regionoj ĉirkaŭ la urbo. Multaj el ili vizitis la Kröller-Müller Muzeon, kiu enhavas la plej riĉan kolekton de la mondfama nederlanda pentristo Van Gogh. Kelkaj aliaj vizitis la ĉaskastelon "Sanktan Huberton", kiu per sia konstruo figuras la legendon pri tiu sanktulo.

Vespere la partoprenantoj kunvenis en la "Provinca Domo", kie ili faris gvidatan promenadon tra la moderna konstruaĵo kaj poste kunvenis en la "Rejna Salono" por ĝui vere kulturan programon.

Sinjinorino A. Kooy—van Holst el Rotterdam meritplene deklamis du mirrakontojn de Godfried Bomans, per kio la eksterlandanoj povis eklerni la humoron de tiu nederlanda verkisto.

Tre laŭdindaj ankaŭ estis la faroj de s-ino Lea de Boer el Kortenhoeft, kiu kantis nederlandajn, francajn, anglajn, skotajn kaj hispanajn popolkantojn, akompanante sin mem per pedalharpo. Versajne s-ino De Boer estas la ununura en la mondo, kiu ekzercas ĉi tiun deklamarton. Per ŝia arta interpretado kaj la teksteksplikado en Esperanto per ŝia edzo, la fremdlingvaj kantoj iĝis tute kompreneblaj.

Vendredon, la 30-an, la gekongresanoj oficiale estis akceptataj de la Arnhema urbestro, reprezentata de la vic-urbestro kaj skabeno de instruado, s-ro Bronkhorst, kiu en sia bonveniga parolado diris, ke Arnhem, kiel ĉenero inter la grandaj nederlandaj havenoj kaj la germana industrioregiono ĉirkaŭ la rivero Ruhr plenumas gravan taskon. Sed ĉi tiu tasko ne povas resti limigita al ekonomiaj rilatoj. Arnhem ankaŭ devas liveri sian parton al la klopodo alproksimigi la diversajn popolojn. Tial estas por la Arnhema vic-urbestro vera honoro akcepti reprezentantojn el tiom da landoj: saluti esperantistojn, t.e. personojn kiuj sur "neŭtrala lingva fundamento" klopodas progresigi la kontaktojn inter la homoj de la tuta mondo. Konsekvence li, nome de la Arnhema urbestro, tutkore bonvenigis ĉiujn partoprenantojn kaj li esprimis la esperon, ke ili reprenu hejmen bonan impreson de Arnhem kaj de ĝia internacia sfero.

Post la lunĉo, prezentita de la komunuma estraro, s-ro Korff dankis pro la regalo, sed precipe li esprimis sian dankon pro la iniciativo fari eksperimenton pri instruado de fremdaj lingvoj en la lernejoj. Almenaŭ ĝi havis la rezulton, ke ĝi interesigis la instruajn aŭtoritatulojn por ĉi tiu problemo kaj ke la ministro de instruado promesis serioze konsideri la egalrajtigojn de la instrudiplomo en Esperanto kun similaj en aliaj lingvoj.

La prezidanto, s-ro Woessink, en sia fermparolo petis la reprezentantojn de la urbestro transdoni la dankon de ĉiuj ĉeestantoj al la kompleta konsilantaro.

Post la lunĉo ĉiuj partoprenantoj faris gvidatan veturon tra Arnhem. Vespere en la restoracio de la parko "Sonsbeek" la tritaga festo estis fermita per kora "ĝis la revido en Arnhem!"



En la Ferma Kunsido post dankvortoj de S-ro Fighiera turisma gvidistino de la urbo Bruselo transdonas al la Prezidanto de L.K.K., S-ro M. Jaumotte, la donacon de L.K.K.

LA SOLENA FERMO DE LA 45-a

Lastan fojon kolektiĝis la kongresanaro en la granda salono ALBERTO I de la kongresejo sabaton matene la 6-an de aŭgusto. Krom la Estraro kaj la Kongresa Prezidantaro, laŭ la kutimo troviĝis sur la podio nun ankaŭ la tuta L.K.K.

En sia enkonduko la Vic-Prezidanto S-ro Holmes transdonis la korajn salutojn de la Prezidanto, Prof. Canuto — kiu laŭ telefona informo fartas jam multe pli bone — al la kongresanaro. La Ĝen. Sekretario Prof. Lapenna resumis la decidojn de la Komitato kaj Estraro, el kiuj pluraj estis akceptitaj kun entuziasmaj aplaŭdoj. Eĉ la informon pri la altigo de la kotizoj, post klarigo kaj motivigo aplaŭde akceptis ĉiuj, kiuj komprenas la situacion. Li transdonis al la Kongreso la proponon de la Komitato kaj Estraro, ke la teksto de la rezolucioj, akceptitaj de la Unua kaj Dua Sekcioj de la Kongreso estu konsiderata kiel Kongresa Rezolucio. La Kongreso aklame akceptis tiun proponon. S-ro Norman Smith mallonge raportis pri la ceteraj laboroj de ambaŭ sekcioj.

Kvankam la Belartaj Konkursoj ne okazis dum la Kongreso, tamen la nomoj de kelkaj gajnintoj povis esti anoncitaj. Plue, Prof. Waringhien proklamis la rezultojn de la Oratora Konkurso kaj disdonis la diplomojn. Per varmaj vortoj la Ĝen. Sekretario transdonis al la gajninto de la unua premio, la multpromesa talenta junulo Karlo Minnaja, sian personan donacon, la arĝentan pokalon, kiu sub la nomo "Premio-Ivo Lapenna" iros de jaro al jaro al la unua premiito kaj portos la engravuritajn nomojn de la gajnintoj.

La Prezidanto esprimis apartan dankon al la Prezidanto de L.K.K. S-ro M. Jaumotte, al ĉiuj unuopaj membroj de L.K.K. kaj al la Konstanta Kongresa Sekretario S-ro G. C. Fighiera. S-ro Jaumotte dankis al ĉiuj kolegoj en L.K.K. pro la bonega kunlaboro kaj ankoraŭ reliefigis pli detale ĉies meritojn. S-ro Fighiera esprimis dankvortojn al la Prezidanto de L.K.K. pro la kompetenta gvidado kaj pro la harmonio kaj konkordo dum la laboroj. En la nomo de L.K.K. li prezentis al S-ro Jaumotte kiel simbolon de respekto kaj estimo speciale faritan prezidantan martelon el nigra ebono kun arĝenta memoriguraĵo. La donacon transdonis unu el la turismaj gvidistinoj de la urbo Bruselo, kiuj dum la vintro lernis Esperanton.

S-ro Norman Smith, kiel Prezidanto de Brita Esperantista Asocio oficiale invitis al la 46-a Universala Kongreso en Harrogate, donante kelkajn detalojn pri tiu ĉarma urbo, gastiginta jam sen-nombrajn internaciajn kongresojn ĉiuspecajn.

Per solena transdono de la kongresa flago de S-ro Jaumotte al membrino de L.K.K.-Harrogate kaj kantado de La Espero finiĝis la granda manifestacio de internacia kompreniĝo kaj kunekzistado, kiu estis ankaŭ tiu ĉi Brusela Universala Kongreso.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1960

Stato je la 31-a de julio

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Japanujo	2470	2855	115.59
2.	Nederlando	5093	5281	103.69
3.	Belgujo	1985	2046	103.07
4.	Svislando	2075	2090	100.72
5.	Britujo	6565	6530	99.47
6.	Francujo	7111	7028	98.83
7.	Finnlando	2515	2385	94.83
8.	Usono	3430	3240	94.46
9.	Svedujo	6605	6110	92.51
10.	Germanujo	7450	6875	92.28
11.	Norvegujo	2035	1868	91.79
12.	Hispanujo	2837	2515	88.65
13.	Danlando	2921	2425	83.02

14.	Italujo	4469	3710	83.02
15.	Jugoslavio	7155	3335	46.61
16.	Brazilo	8260	2931	35.48

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Argentino	815	910	111.66
2.	Aŭstrujo	1425	1555	109.12
3.	Aŭstralio	1076	1101	102.32
4.	Sudafriko	250	255	102.—
5.	Kanado	615	610	99.19
6.	Israelo	250	240	96.—
7.	Portugalujo	575	535	93.04
8.	Urugvajo	255	230	90.20
9.	Novzelando	989	795	80.38
10.	Islando	270	205	75.93
11.	Maroko	256	190	74.22
12.	Madagaskaro	250	177	70.80

RADIO

Ciujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo la horoj de la disendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Por tempoj kaj ondlongoj vidu la oktobran numeron.

Radio Roma. 2-IX, la Reĝa Palaco de Caserta; 6-IX, Tra la literaturo; 9-IX, Itala provinco Sondrio; 13-IX, Sankta Luisa el Mérillac; 16-IX, Novaĵoj el Italujo; 20-IX, Italaj kanzonoj en Esperanto; 23-IX, Leterkesto kaj bibliografio; 27-IX, La unua opero "Euridice" de Jacopo Peri; 30-IX, Italujo kaj fremdaj verkistoj: A. de Lamartine. Krome, ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto.

Radio Zagreb. 1-IX, Pri S.A.T.-kongreso kaj aliaj esperantistaj aranĝoj; 8-IX, Pri la junulara esperantista laborbrigado; 15-IX, Mozaiko-kuriozaĵoj; 22-IX, Memore al F. Chopin; 29-IX, Respondoj al korespondantoj kaj novaĵoj el la movado.

UNIVERSALA ESPERANTO - ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM-2 NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

la 1-an de aŭgusto 1960

N-ro 329

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de julio kaj ankaŭ por komparo je la fino de julio 1959:

	1959	1960
Asociaj membroj	15626	11082
Individuaj membroj		
MJ	805	780
MA	5141	4827
MS	506	552
Pat.	7	5
DM	335	349
HM	45	43
JMJ	26	27
JMA	164	182
	7029	6765
	22655	17847

DELEGITOJ

Aŭstrujo

Linz FD (naturismo): La D.

Belgujo

Antwerpen FD (aŭtomobiloj): S-ro

Ferdinand Volders, reprezentanto, Jan de Vos Lei 53.

Gent (Oost Vlaanderen) FD (ekonomio kaj industrio): S-ro Maurice De Clercq, lic. komercaj kaj financaj sc., 86 Zwijnaarde Steenweg.

Danlando

Odense (Fyn) FD (turismo): F-ino Gunhild Thomsen, kontoristino, Vis-senbjergvej 10.

Finnlando

Helsinki-Oulunkylä (Uudenmaan 1) FD (pentarto): S-ino Helja Favén, Mikkolantie 5.

Francujo

Briançon (Hautes-Alpes) FD (juro): S-ro Jean Duthilleul, advokato, 7 rue Commandant Carlhan.

Carpentras (Vaucluse) FD (turismo): S-ino Elise Bonnafois, emerita profesorino, Bd. des Boëttes.

Marseille (Bouches-du-Rhône) FD (komercio): S-ro Jean Ronda Yvars, komerc-agento, Avenue Saint-Just, 57, Bloc A, Marseille 4.

Paris (Seine) FD (asekuro): S-ro Pierre Petit, ĝenerala inspektoro pri asekuroj, 58 Rue de la Victoire.

FD (maristaj aferoj): vakas.

Rosny-sous-Bois FD (popoluniversitatoj): S-ro Pierre Petit, asekuristo, Rue Rochebrune 26.

Sancoins (Cher) FD (instruado): S-ro Roger Blanc, instruisto, Ecole M. Audoux.

Germanujo

Gotha (Thüringen) D: S-ro Herbert Wohlfahrt, inĝeniero, Thälmannstr. 43. D.D.R.

FD (naftoborado): la D.

Karlsruhe FD (socia sekuro): S-ro Otto Böhm, ĉefinspektoro, Danziger Str. 8, Rüppurr.

Hispanujo

L'Armentera (Empordà) D: S-ro Josep Armengol Vergés, lignokomercisto, Strato D-ro Zamenhof 42.

Barcelona FD (desegnado industria): S-ro Bartolomé Serra Hernández, desegnisto komerca, Mallorca 440-1º-1º.

Granollers (Barcelona) D: S-ro Tomás Tónico Bardina, industriisto, Str. Alfonso IV, 91.

Guareña (Extremadura Badajoz) D : S-ro Antonio Agudo Acuña, pastro, Paroquia de Sta. Maria.

Huete (Cuenca) D : S-ro Luis Angel Ramírez Teruel, telegrafestro, telegrafoficejo.

Jaën (Andalucia) D: S-ro Juan Anguita Galàn, kontoristo, Strato Capitán Oviedo 9.

Pravia (Oviedo) D : Manuel Manteca, notario, Fontana 10, 2º.

Sama de Langreo (Oviedo) D : S-ro Sacramento Collado Llana, ŝtata instruisto, Strato Aurelio Delbrouck 4-1.

Valencia D : S-ro Jaime Juan Forné, kontoristo, Marti 3.
FD (mondfederalismo) : la D.

Zaragoza FD (instruado): S-ro Miguel Sancho-Izquierdo, universita profesoro, Torre nueva 30.

Italujo

Caorle (Venezia) D : S-ro Luigi Marchesan, oficisto, Viale S. Antonio 26/4.

Reggio Emilia D : S-ro Alberto Jemmi, lernejdirektoro (pensiulo) Via Astico 11.

Treviso D : vakas.

Jugoslavio

Beograd FD (asekuro socia) : S-ino Jelena Šaponjić, oficistino, Svetog Save 23/I.

Nederlando

Amsterdam (Noord-Holland) FD (matematiko) : S-ro W. A. Verloren van Themaat, Churchillaan 101 IV.

Winkel (Noord-Holland) D : vakas.

Pollando

Chorzów (Śląsk) FD (turismo) : S-ro Rudolf Skorupa, teknikisto, ul Wrocławska 2, Batory.

Portugalujo

Santarem (Ribatejo) D : S-ro Eduardo Almeida Trindade, komercisto, Rua Pedro de Santarém 79-1.

FD (komerco) : La D.

Sovet-Unio

Kaunas D : S-ro Petras Varkauskas, librotenisto, Višinskio 25.

Kiev (Ukrainskaja SSR) FD (laktmastumado) : S-ro Panas Petrovič Vasilčenko, inĝeniero de laktmastrumado, Bogomolca 5 kv. 20, Kiev 24.

Moskva VD: F-ino Vera Zlotnikova, studentino, B. Ekaterininskaja 18/20 kv. 25, Moskva I-110.

Tallinn (Estona SSR) FD (filozofio/marksismo) : S-ino Helve Kaps, Pärnu mnt. 500-3.

FD (muziko): S-ro Enn Kelts, ĉefo de poŝtejo, poŝtejo, Tallinn-Merivälja.

Tula (Rossijskaja FSSR) D : S-ro Ilja Andrejevič Kiselev, librotenisto, 1 Krasnij pereulok 9.

Svedujo

Hallsberg (Närke) VD : S-ro Rune Wrigman, fervoja oficisto, Parkvägen 17.

Linköping (Östergötland) FD (ŝosekonstruado) : S-ro Hj. Alderin Leijder, inĝeniero, Poŝtfako 2111.

Svislando

Zürich FD (fiziko) : vakas.

Usono

Davidson (North Carolina) D: vakas.
FD (universitataj aferoj): vakas.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ

521 Micoud, S-ro Fernand, Nemours, Alĝerio.

522 Stellman, S-ro Leon, London, Britujo.

523 Keller, S-ro Ad., La Celle-St. Cloud, Francujo.

524 Volkanoska, D-ino Alexandra, Skopje, Jugoslavio.

525 Ramananjatovo, S-ro Simon, Tamatave, Madagaskaro.

526 Cojean, S-ro L., Meknès, Maroko.

527 Zeyl. S-ro G. H. H. van, Arnhem, Nederlando.

528 Reisaeter, S-ro Trygve, Odda, Norvegujo.

529 Crook, S-ro Brian, Christchurch, Nov-Zelando.

530 Traylen, S-ro D. J., Auckland, Nov-Zelando.

FONDAJO ZAMENHOF

Antaŭa sumo : 18294,33 gld.

Carlos Bongiovanni 4.50 gld., R. López Dominguez 5.80 gld., Argentino; S-ro Sikora 1.15 gld., Francujo; F-ino Barbara Tribe, 5.29 gld., Britujo.

Entute 18.311,07 gld. je 1.8.1960.

Donacu unu milonon — aŭ pli!! — de viaj jaraj enspezoj por tiu ĉi gravega celo! Ankoraŭ ne ĉiuj elspezoj por la Zamenhof-Jaro estas kovritaj.

DONACO AL C.E.D.

S-ro H. V. Rasmussen, Danlando £ -.10.4.

DONACOJ AL ĜENERALA KASO

S-ino W. Laurie, Britujo 3.15 gld.; N. N. Germanujo 90.23 gld.; S-ro Roland Barta, Usono 11.71 gld.; S-ro J. Futran, Usono 3.85 gld.; S-ino Klara Justis, Usono 7.51 gld.

DONACOJ AL A.P.O.

S-ro Sikora, Francujo 1.54 gld.; S-ro R. H. Bossong, Nederlando 10.— gld.; F-ino Karla Olsson, Svedujo 9.75 gld.; S-ro Sven Sjöblom, Svedujo 20.— gld.

Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon.
M. H. Vermaas,
Direktoro C.O.

ANONCETOJ

Mi korespondas kun ĉiu interesulo precipe kun lingvano ne apartenanta al la hind-eŭropa lingvaro, pri : kio en E estas facila por vi, kio ne ! Kio plaĉas al vi, kio ne ! Ĉio rilate al strukturo, gramatiko, afiksaro, vortmaterialo kaj formado ktp. Atentu mian jubilean anoncon en jarlibro 1959, p. 332 ! H. Dresselhaus (Brockmann) en Schloss Holte, Westf., Germanujo.

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Gasthuisstraat 68, Tilburg, Nederlando.

La Budha Lumo — Organo de la Budhana Ligo Esperantista; Jarabono: 4 ŝilingoj. Kasistino : M. E. Bowden, "Clarach", Abbey Drive, Gronant/Prestatyn, N. Wales, Britujo.

Skoltoj en 19 landoj abonas al "La Skolta Mondo" kaj Skolta Esperantista Ligo. Informpetu ĉe Charles

Bardsley, 42 Westbourne St., Oldham, Lancs., Britujo.

Ludoviko Vallés, Gran Via 423-5-3-, Barcelona 15, Hispanujo, teknika sciulo, 22-jara, volas interŝanĝi bildkartojn kaj turisman propagandon el la tuta mondo.

Kontraŭ poŝtmarkoj hispanaj, francaj, italaj, afrikaj kaj sudamerikaj mi sendos egalkvanton da germanaj. S-ro Guido Robl, Giselastr. 3, Passau, Germanujo.

Deziras interŝanĝi bildkartojn el la tuta mondo. I. Rode, Artilerijas 73-31, Riga, Latvio, USSR.

Aosta Regiona Turisma Oficejo ne intencas eldoni Esperanto-prospektojn, ĉar neniu petas la milojn ankoraŭ disponeblajn. Bonvolu do senprokraste peti ilin al supredirita adreso.

Deziras ĉiajn esperantaĵojn por malgranda ekspozicio en oktobro David Withey, 21 Brookfield Avenue, Waterloo, Liverpool 22, Anglujo.

La vidvino de Sinjoro Frank H. Sweet, Sr., Windsor, Ontario, deziras

informi ĉiujn liajn korespondintojn, ke ŝia edzo mortis la pasintan januaron. Oni devas bedaŭrinde konsideri la interkorespondadon finita.

Serioze interŝanĝos poŝtmarkojn el Anglujo kaj la anglaj kolonioj ankaŭ el Aŭstralio, Kanado, Nov-Zelando, Sud-Afriko, laŭ katalogo Stanley Gibbons. Rekompencas per svedaj poŝtmarkoj. Korespondas : Esperante, Angle kaj Germane. Respondas tuj kaj certe Ing. S. A. Kreij, Prinŝgatan 12, Skövde, Svedujo.

Bonvolu sendi salutojn diversajn por decembra ekspozicio, kaj pruvu ke Esperanto vivas. Respondos S-ro E. Beever, 18 Fox Street, Cleckheaton, Yorkshire, Anglujo.

Pri imagita mondkatastrofo fine de 20-a jarcento vi legu interesan ĉapitron el romano de Mór Jókai en "Paco", okt. 1959. Ekzemplero por 1 rpk. P. Balkányi, Budapest II.A.-Haraszt-u-33.

Fina venko. Sendu viajn ideojn al D. Soleo, Esperanto-Civito, 14B Castle Avenue, Dover, Britujo.

APERIS

La Memorlibro

pri la

Zamenhof-jaro

Monumento al la aŭtoro de la
Internacia Lingvo

Riĉa fotomaterialo

Elegante bindita

Prezo : 12,50 gld.
50.— steloj

Havigu al vi ĉi tiun valoran verkon !

Eldonis C.E.D. Mendu ĉe U.E.A.
Eendrachtsweg 7 — Rotterdam

Unua kaj unika libro pri fiŝoj en Esperantujo

Sekretoj de la Marestaĵoj

de Petar Giunio

reverkita de Lic. Marinko Ĝivoje

aperos baldaŭ sub aŭspicioj de UEA

"Scienca laŭ enhavo ĝi estas beletra laŭ vestaĵo"
— diras pri ĝi E. Balech en la enkonduko.

En ĉi tiu interesega, streĉa kaj instrua romano pri marestaĵoj la aŭtoro senvualigas al ni la sekretojn ekde la mikroskopaj estaĵoj ĝis la plej grandaj fiŝoj kiuj vivas en la maro — lulilo de la vivo sur nia planedo.

Riĉaj plurkoloraj ilustraĵoj kaj abunda listo de fakterminoj kun difinoj kaj plurlingvaj ekvivalentaĵoj pliriĉigas la valoron de ĉi tiu verko.

Jen titoloj de kelkaj ĉapitroj : Nevidebla martrezoro; Defendo per kemiaj armiloj; Interesaj kooperativoj; Bestoj kun inkujo; Lertaj aviadistoj; Fiŝoj aŭdigantaj voĉon; Venenaj fiŝoj; Fiŝo kun segilo ktp.

Provizora prezo : 5.— gld., 20 steloj.

Mendu ĝin jam nun ĉe U.E.A. !

Aŭtunaj Feriaj E-Kursoj

Vejle, Danlando

Internaciaj aŭtunaj feriaj E-kursoj (daŭriga, perfektiga kaj konversacia) okazos ankaŭ nunjare (16.—23. de okt.) en Sporta Altlernejo de Vejle, Danlando, kies arbaroj precize je tiu tempo portas sian plej multkoloran veston. Ni invitas vin veni por ĉeesti kaj por ĝui plej agrablan kaj neniam forgesiĝan semajnon. Petu senpagan programon ĉe

L. Friis,
Ingemannsvej 9,
Aabyhøj, Danlando

La nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de

Prof. G. Waringhien

kun kunlaborado de la plej famaj verkistoj

aperas ĉiun duan monaton

32/40 paĝa - - poŝformato jare fr. fr. 400.- aŭ
egalvaloro

Ricevas la abonojn :

En Francujo : R. Fiquet, Poŝta konto 2259-98
Marseille

Alilande : Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj landaj Perantoj
de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio : 7 Av. Léon-Gourdault
Choisy-le-Roi (Seine) Francujo.

Administracio : 5 Bd. Stalingrad
Nice (A.M.)

UNESCO COURIER

granda kultura revuo eldonata de
U.N.E.S.C.O.

publikigis en sia numero de decembro
1959 grandan artikolon pri Zamenhof

Tiu numero en angla, franca, hispana aŭ
rusa lingvo estas ricevebla ĉe la landaj
U.N.E.S.C.O.-instancoj kaj ĉe U.E.A.

Montrinda al ĉiuj neesperantistoj

Prezo : inkl. sendkostojn : 0,50 gld; 2 steloj.

Mendante, indiku la deziratan lingvon !

* * *

Krome, riceveblaj ĉe U.E.A.

12 BELEGAJ FOTO-AFIŜOJ

kun Esperanto-teksto, pri la

HOMAJ RAJTOJ

Eldonis UNESKO Prezo : 4 int. resp. kuponoj aŭ
egalvaloro por la tuta serio.

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam.

